Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 25 — trimonata

4/95

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunredaktintoj de la aktuala numero:
Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Géza KURUCZ,
Françoise NOIREAU kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
H-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836 (hejma kun respondaparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

Raita PYHÄLÄ: La finnlanda eduksistemo 1
La 3a Gimnazia Semajno de ILEI (Zsuzsa BARCSAY) 3
Katalin SMIDÉLIUSZ: BEKunu, BEKDdu...(Intervjuo kun D. KEEFE) 5
Ulrich MATTHIAS: Ideoj por konversacioj 12
Françoise NOIREAU: La testudo parolanta 13
Miklós FEHÉR: Instruado per poemoj 15
Kiel mezuri lingvoscion (Géza KURUCZ) 15
El la landoj kaj sekcioj 17
Reagoj (Petro RULOFIDO, Stefan MacGILL) 20
Recenzoj (F.G. RÖSSLER, Georgo KAMAĈO) 24
Forumo (Roberto RESENDE, Géza KURUCZ, János PETIK) 26
Por via notlibro, Leterkesto, Postparolo 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu.
Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado.

Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio.
Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Membro: Brunetto Casini, Casella Postale 213, I-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85

Membro: Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Cordoba, Argentino

Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303.
Eksteraj rilatoj, instruado de infanoj.

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342.
Gimnazio de ILEI. Servoj al instruistoj, trejnado de instruistoj.

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario.
Eldonado

Observanto (UEA): Renee Triolle, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, F - 77160 Provins, Francio

Raita Pyhälä: LA FINNLANDA EDUKSISTEMO

La eduksistemo en Finnlando daŭre ŝanĝiĝas, kaj kvankam la ŝanĝoj ne estas rapidaj, multaj geinstruistoj plendas, ke tiuj ŝanĝoj malhelpas la instruadon.

La baza edukado estas senpaga kaj deviga al ĉiuj infanoj. Ĝi daŭras 9 jarojn, nome en la aĝo de 7 ĝis 16. Nuntempe oni multe diskutas pri tio ke la komenco devus esti pli frua, sed la majoritato de la familioj ne volas sendi siajn infanojn al lernejo antaŭ la sepa jaro. Finnlando ja ne estas dense loĝata lando kaj la distancoj inter la hejmoj kaj la plej proksima lernejo povas esti dekoj da kilometroj en la kamparo, en Laponio eĉ centoj da kilometroj. En la urboj kaj en la ŝoseoj la trafiko tamen ofte estas danĝera por infano.Vintre la vetero estas ege malvarma kaj la malhelo, kiu daŭras preskaŭ la tutan tagnokton, plie danĝerigas la trafikon, precipe la promenadon aŭ bicikladon. La naŭ-jara baza edukado dividiĝas je du partoj: 6+3. En la unuaj klasoj la infanoj estas instruataj de la sama instruist(in)o en ĉiuj fakoj kaj tuttempe. Tiun mi nomas klasinstruisto. Knaboj kaj knabinoj sidas en la sama klasejo, ludas en la sama korto. Ili ne havas specialajn lernej-vestojn. Ilia tago kutime daŭras kvar- ses horojn, kaj ĉ. je la dekunua ili havas lunĉopaŭzon. La lunĉo estas senpaga. La lecionoj daŭras 45 minutojn kaj la paŭzoj 10-15 minutojn, sed unuopa klasinstruisto rajtas plani la lernotagon alimaniere: la infanoj ion finstudas, kaj poste havas paŭzon sendepende de la horloĝo. Dum la paŭzo ili ludas, kuras kaj kriadas en la korto, kie troviĝas balanciloj, grimpadejoj, ŝnuroj kaj pilkoj. Iu instruisto devas ĉiam ĉeesti por eviti akcidentojn kaj reciprokajn turmentadojn de la infanoj.

Tikla demando estas la fumado. Ĉi-jare venis leĝo malpermesanta vendadon de tabako al gejunuloj malpli ol 18-jaraj. Krome al la adoltoj ne licas fumi en la ejoj kie troviĝas gejunuloj aŭ infanoj. Feliĉe ne multaj geinstruistoj fumas, en mia lernejo neniu el la tridek.

En la aĝo de 13 jaroj la geknaboj devas ŝanĝi lernejon. Ili ne plu estos instruataj de klasinstruistoj sed de speciala instruisto en ĉiu fako. La aĝo de 13 ĝis 16 jaroj estas konsiderata malfacila: parte pro pubereco, parte pro la problemoj akumuliĝintaj dum la 6 antaŭaj klasoj. Mi persone spertas kiel malfacile estas instrui al ili fremdan lingvon — kutime la anglan. La diferencoj inter la lernantoj povas esti grandegaj. Iuj kompatindaj lernantoj ne kapablas sekvi la lecionojn, fari sian hejmtaskon en la angla, — kaj nun ili devas sidi kaj klopodi silenti kaj ne ĝeni la instruadon dum 3 jaroj. Du-tri tiaj geknaboj — pli ofte knaboj — povas ĝeni kaj malhelpi la laboron de la tuta klaso. Tamen preskaŭ neniam oni permesas al malsukcesa lernanto ĉesi la lernadon de fremda lingvo. Laŭ mia opinio oni devus ebligi al ili elekti iun alian, pli utilan

lernoobjekton anstataŭ la angla, kiu nur detruas ilian memkonfidon kaj ofte rezultigas ĝenan konduton. La lernotago de la 13-16 -jaruloj daŭras 6 horojn. Ankaŭ ili lunĉas lerneje. En la kamparo ili ofte aŭtobusas al/de lernejo. Por unuopaj fore logantoj oni uzas taksiojn. La veturado estas senpaga, se la distanco pli longas ol 3 km, sed ĝi povas longi plurajn dekojn da kilometroj. En la plej maldense loĝata Laponio oni havas kelkajn kolegiojn, sed nuntempe la lernantoj preferas vojaĝi eĉ cent kilometrojn por reveni hejmen ĉiuvespere.

Dum kelkaj semajnoj la lernantoj ne frekventas la lernejon, — tiam ili iras labori; fakte ne por perlabori monon sed por ekkoni la laborejojn de la ĉirkaŭo. La eblecoj kaj kondiĉoj kompreneble multe diferencas inter urboj kaj kamparo. Vilaĝe oni povas praktiki en banko, vendejoj, biblioteko, bienoj, laktejo, maljunulejo, aŭ en la municipa oficejo. Post 9 jaroj da baza edukado la gejunuloj — kutime 16-jaraj — povas daŭrigi studadon aŭ serĉi laboron aŭ resti hejme, ekzemple por kulturi la familian bienon.

La gimnazio estas tri-jara kaj poste la studentoj metas nacian abiturientan ekzamenon pri 5-6 fakoj. Lastatempe multaj gimnazioj fariĝis senklasaj: tie oni povas studi pli aŭ malpli rapide, trapasante la gimnazion en 2-4 jaroj. En nia epoko oni ne plu povas studi por nur unu dumviva metio: multaj devas preti ŝanĝi laboron plurfoje dum la vivo. Oni devos denove kaj denove reinstruiĝi. La kondiĉoj daŭre ŝanĝiĝas kaj necesas ĉeesti kursojn por adaptiĝi. Tio koncernas kaj la instruistojn kaj la studentojn. Ekzemple la komputado, kiu jam eniris la lernejojn, devas esti instruata al la geinstruistoj, kiuj ne havis la eblecon lerni ĝin en iliaj studjaroj. Venas novaj instrumetodoj, novaj konceptoj pri la psikologio de la lernado, novaj administraj regularoj. La re-edukado de la instruistoj estas ofte postulata kaj pagata de la ŝtato, sed ekzemple la lingvoinstruistoj devas reinstruiĝi proprakoste, ofte eksterlande.

Krom la edukado de infanoj kaj gejunuloj ni havas studejojn por ordinaraj plenkreskaj civitanoj en ĉiu vilaĝo kaj urbo. Tie instruatas plej diversaj fakoj praktikaj kaj teoriaj: lingvoj, leĝo, kuirarto, teksado, kudrado, statistiko, komerco, loka historio, fiŝkaptado, ĉasado, riparado de aŭtoj, pentrado ... eble eĉ Esperanto. Tamen la manko da mono nuntempe ĉie malfaciligas instruadon kaj malpliigas la horojn uzeblajn.

Pri la lingva demando mi parolu iom pli detale. En la aĝo de 10 jaroj la infano devas eklerni iun fremdan lingvon. Plej ofte la gepatroj elektas la anglan, ĉar tio ŝajnas sekura — la elekto de la majoritato. Antaŭ 50 jaroj la majoritato elektis la germanan. Antaŭ cent oni devige lernis la rusan. Antaŭ 200 jaroj oni apenaŭ povis studi sen unue lerni la svedan. Pli frue oni devis regi la germanan aŭ la latinan por eniri lernejon. Sed mi revenas al la nuno.

La aŭtoritatuloj rekomendas, ke oni elektu diversajn lingvojn, ĉar ni bezonas homojn, kiuj posedas la germanan, la rusan, la francan kaj verdire

ĉiujn lingvojn de la mondo. Principe ĉiu finno devus scii la svedan, Finnlando ja estas dulingva lando. Same ĉiu svedlingva finnlandano devus posedi la finnan. Krome la gepatra lingvo de ĉ. 2000 homoj en Laponio estas la samea. Kelkaj enlandaj ciganoj deziras instruadon en la cigana. Enmigrintoj kaj rifuĝintoj diverslingvaj bezonas instruadon en sia lingvo. Tamen neniu larĝa kaj varia lingvoprogramo estas en la lernejoj. La majoritato elektas la anglan. La gepatroj timas: se ili elektus iun alian lingvon por la gefiloj, estiĝus malhelpoj. Eble la infano devus iri al alia, pli fora lernejo, kie kunvenas la lernantoj de tiu lingvo. Eble la familio iam translokiĝos kaj en la nova municipo ne haveblus instruado en la lingvo elektita por la infano. Nur loĝantoj de la ĉefurbo, povas konsideri la eblecon sendi la infanon en anglalingvan/ franclingvan/ germanlingvan/ ruslingvan lernejon.

En la vere dulingvaj municipoj kelkaj finnoj elektas svedlingvan lernejon kaj kelkaj svedoj finnlingvan. Dulingveco estas riĉeco, tion komprenas kelkaj, ne ĉiuj. Kelkaj studentoj ne vere kredas, ke ili iam bezonos iun fremdan lingvon. Kaj studante la fremdan lingvon ĉiuj dezirus lerni PAROLI, sed nia instruado en la gimnazio postulas gramatikan korektecon, riĉan vortaron ... ne ĉion oni povas akiri dum la horoj haveblaj. Kelkaj instruistoj de aliaj fakoj plendas, ke la lingvoj forrabas tro da tempo.

En kelkaj lernejoj oni decidis instrui plurajn fakojn angle, por pliigi la lingvoscion. Mi mem ne tre ŝatas tion. Iam ni finnoj forte batalis por ekhavi finnlingvajn lernejojn; ĉu ni nun deziras havi anglajn? Krome, nur la lingve plej talentaj lernantoj povas vere sekvi la fremdlingvan instruadon.

Kaj kiun lokon havas Esperanto? Laŭ la peto de la ministro de publika instruado, laborteamo studis la rolon de E-o en niaj lernejoj. Raporto de la teamo, publikigita en 1984, rekomendis E-on precipe kiel propedeŭtikan fakon. Aŭtoritatuloj ne akceptas E-on kiel A-lingvon, se grandaj internaciaj organizaĵoj kiel UN ne ekuzos ĝin. Malgraŭ ke E-kluboj estas rekomendataj, la lernejanoj apenaŭ interesiĝas: ili estas jam tro ŝarĝitaj per aliaj fakoj kaj okupoj.

La 3a Gimnazia Semajno de ILEI

En la kadro de la 29a Konferenco de ILEI, en la domo Övik (apud la urbo Porvoo/Borga) okazis la 3a Gimnazia Semajno kun partopreno de ses gejunuloj: tri gefratoj el Britujo: Rolf, Gavan kaj Petra Fantom; krome Martina Gazdek el Kroatujo, Estelle Loiseau el Francujo kaj Janko Luin el Svedujo. Ankaŭ "honoran" gimnazianon ni havis: Rustam Ragabov el Taĝikio, kiu fakte estis akompananto de sia patrino, sed havante la aĝon de ILEI-gimnaziano, li volonte aliĝis al kelkaj lecionoj kaj aliaj programeroj, kaj ankaŭ la gimnazianoj volonte akceptis lin.

La programo en la gimnazio klopodis esti varia: Ĉiutage okazis averaĝe ses lecionoj po 30-minutoj pri jenaj objektoj: la Finna lingvo; Esperanto-literaturo: kontribuo de la Finnoj (ilin ambaŭ gvidis *Raita Pyhälä*); muziko, lernado ludi kantelojn (finna instruistino *Sylvia Hämäläinen*); primovadaj konoj; Esperantaj proverboj (ambaŭ fare de *Roza Petuĥova* el Rusio); komunikado, neparolaj esprimmanieroj en diversaj kulturoj (*Atilio O. Rojas* el Argentino); geografio, energio, ekologio k.s. (*Stefan MacGill* el Novzelando/Hungario); kaj literatura-morala legaĵo pri la Suoma prizon-misiistino *Matildo Vrede'* (Matilda Wrede). *Zsuzsa Barcsay* el Hungario – honore al la Suomia popolo – kompilis apartan kajereton pri ŝi speciale por la Gimnazio en Övik.

Dum la semajno la gimnazianoj kontribuis al publikaj lecionoj antaŭ la konferencanaro pri geografio, pri la Finna lingvo kaj pri parkerigado de E-aj proverboj. En la adiaŭa vespero ili surscenigis fragmenton el la prozforma epopeo *Sep fratoj* de Aleksis Kivi: kiel la plej juna frato instruas la abocon al la pli aĝaj; krome du bildojn el la amoplena agado de Matildo Vrede' inter krimuloj-malliberuloj. La adiaŭa vespero disponigis bonan okazon ankaŭ por prezenti, kion kaj kiom ili sukcesis lerni ludi kantelon, la faman Finnan muzikilon (S. Hämäläinen kunportis apartan pecon al ĉiu gimnaziano).

La gimnazianoj loĝis en tendoj, ili havis agrablan ĉambron apud la konferencejo/manĝejo, kies ŝrankoj enhavis ĉiajn objektojn, kiujn ni bezonis por la skeĉoj; la geknaboj manĝis kun la konferencanoj kaj ekskursis kun ili al la urbo Porvoo/Borga, kie ni vizitis i.a. la grandioze ekipitan gimnazion, kies direktorino afable estis je nia dispono en la mezo de la someraj ferioj (dankon!); la infanoj ĝuis "promenadon" per motorboato sur la maro kune kun siaj gvidantoj; kaj ĝuis ankaŭ grandan memstarecon por utiligi la liberan tempon per sinbanado, naĝado, boatumado, tablotenisludo, amika babilado kaj mem-preparado al la adiaŭa vespero.

Krom la jam menciitaj prezentaĵoj, la gimnazianoj surprizis la publikon ankaŭ per pluraj muzikaj programeroj: Martina prezentis fortepian-solludon (ŝi donis jam plurajn koncertojn en Esperantujo); Rolf majstras violonon: lian tre bonan solludon Martina akompanis per piano. Rolf ankaŭ komponas modernan muzikon, du pecojn li prezentis per kantado kun maŝine reludata orkestra akompano. Janko anoncis la unuopajn programerojn kaj bone li gvidis la tutan programon. Ankaŭ Rustam aperis sur la scenejo kiel gardisto en la prizono, kie Matildo Vrede' vizitadis siajn "amikojn".

En iu komitatkunsido kelkaj konferencanoj demandis, *kian utilon donas la gimnazio al la konferenco*. Tute konkrete mi respondas: En la publikaj lecionoj ni renkontis diversajn pedagogiajn tendencojn: Roza Petuĥova rigore postulas aŭtomatigon/parkerigon de granda kvanto da konoj kun impona parolrapideco kaj kun nediskutebla sukceso. Raita Pyhälä delikate traktas la individuojn de la lernantoj kaj respektas ilian volon-nevolon, intereson, kaj nenion ŝi altrudas. Stefan MacGill per vivproksimaj, aktualaj situacioj motivas la lernantojn por

elvolvi veran komunikadon surbaze de informmanko. Li donas la necesajn instrukciojn, kaj dum la diskutado de la gelernantoj li restas en la fono, helpas nur en la kazo de bezono.

La pridiskutado de tiuj lecionoj estis la plej *valora metodika-pedagogia enhavo de la konferenco* (nun mi ne parolas pri la Mazi-filmo, nek pri propedeŭtikaj kaj instrupolitikaj temoj). La ĉeesto de grupeto da lernejanoj, la persone spektataj instruhoroj kaj la fakaj diskutoj pri ili faras la konferencon vivproksima al lerneja medio. Pluraj el la konferencanoj tute ne aŭ ne plu havas eblecon instrui Esperanton, sed en la konferenco ankaŭ ili havas kontakton kun Esperanton parolantaj lernejanoj. La gimnazio savas la konferencon de pure teoria meditado pri instrumetodoj kaj manieroj. La gimnazianoj povas instigi la konferencanojn estonte prepari kaj kunvenigi kelkajn el iliaj gelernantoj. Ĉio ĉi estas la celo de la ILEI-Gimnazio rilate al la konferenco.Kiomgrade ni sukcesis tion efektivigi, prijuĝu tiuj, kiuj ĉeestis en Bratislavo, Valencio kaj en Övik.

Ĉiuokaze ni antaŭvidas la 4an Gimnazian Semajnon venontjare en Ĉeĥujo. Venu kun viaj gefiloj aŭ gelernantoj 13-16-jaraj, Esperanton jam parolantaj. Ni povos akcepti 20 geknabojn. Vi vidos, ke vi preparos vin kaj partoprenos pli "pedagogie", ol se vi venus solaj. (Tamen, ankaŭ solaj vi estos bonvenaj!)

Restas nur la agrabla devo danki al niaj du finnaj koleginoj, kiuj faris ĉion eblan por la sukceso de nia gimnazio: al *Sylvia Hämäläinen* aparte pro la belaj kantadoj ĉirkaŭ la fajro, kaj al *Raita Pyhälä*, Esperante *Saliko*, pro ĉiuj organizaj kaj personaj servoj, aranĝoj, informoj, klarigoj, proponoj, disponigo de ĉio necesa. Same tiel dankon al *Bertil Andreasson*, la kasisto de ILEI, kiu finance kaj organize multe subtenas la gimnazion, konsiderante ĝin grava parto de la konferenco. Kaj dankon al la gekolegoj, kiuj gvidis lecionojn; aparte al tiuj, kiuj memvole submetiĝis al publika diskuto pri siaj instruhoroj.

Jen mesaĝo al la venontaj organizantoj*: Ni venos al Ĉeĥujo!*

Zsuzsa Barcsay
la gvidanto de la Gimnazio

Intervjuo kun Dennis Keefe


Katalin Smidéliusz

BEKunu, BEKdu, BEKtri, BEKkvar...

Konata problemo estas en nia movado la manko de bone preparitaj lingvoinstruistoj. Manke de ili en diversaj kluboj kaj E-grupoj la komencantoj seniluziiĝas post kelkaj vizitoj, ĉar la klubanoj aŭ krokodilas (kaj el tio oni malmulte lernas), aŭ la jam bone parolantoj klopodas dum kelkaj renkontiĝoj fulmrapide "instrui" al la novuloj "la plej facilan lingvon en la mondo". Kvankam nia lingvo estas vere relative facila, ne sufiĉas nur por aŭskulti la skemon de ĝia gramatiko, sed nepre necesas praktikado de ties formoj, vortoj

kaj strukturoj. Por helpi la tiutipan alproprigon de la lingvo ni malkovris verŝajne bonan manieron, detale prilaboritan programon de Dennis Keefe, usonano loĝanta en Francio. En Grèsillon (Francio) antaŭ lia studsemajno ni petis lin prezenti sian kurson al la legantoj de IPR. Antaŭ ni sur la tabulo estis sternitaj pluraj diverskoloraj kajeroj por konvinke kredigi al ni, ke la kurso estas ampleksa, serioze prilaborita, nepre analizinda por ni lingvoinstruistoj.

El kio konsistas via kurso?



La tuta BEKkurso konsistas el kvar niveloj. Ĉiu nivelo havas lernolibron kiun la lernanto uzas por praktiki dum la leciono, sed ankaŭ estos lernolibroj por studi la vortojn kaj gramatikon hejme, ekster la leciono. Plie estos ekzamenoj kiuj daŭras inter du kaj kvar horoj por ĉiuj niveloj. Krom tio estos pedagogiaj lernolibroj por la gvidanto de la kurso. Do, estos entute minimume 12 libroj, el kiuj nun 6 estas pretaj, sed neniu el ili estas eldonita ĝis nun pro la nekonateco de BEK

Kiom da paĝoj tio ampleksas?

Por la enlecionaj lernolibroj estas proksimume 40 paĝoj por ĉiuj el la kvar niveloj, do 160 entute. Por la hejmtaskaj libroj, la BEKunu hejmtaska libro enhavas 92 paĝojn, kaj mi pensas, ke la aliaj tri hejmtaskaj libroj havos proksimume po cent paĝoj, do estos pliaj 400 paĝoj. Kaj la pedagogiaj libroj, ekzamenoj, tekstoj por venontaj kasedoj ktp.

Por komencantoj oni trovas multe da lernolibroj, kion novan prezentas via BEKkurso?

Estas, laŭ mi, du novaĵoj. Unue, la BEKkurso estas tuta kursaro. Kiam la lernanto finas BEKunu, li povas iri rekte kaj senhezite al BEKdu. Kaj poste al BEKdu, BEKtri kaj BEKkvar. La lernanto ne bezonas atendi, ĉar ĉio lernenda estas tie, kiam li bezonas ĝin. Kiam mi instruis en Grésillon, ekzemple, la lernantoj kiuj finis mian unuagradan kurson (BEKunu + BEKdu, dum du semajnoj), tuj kapablis rekte iri al la duagrada kurso kun aliaj lernantoj kiuj jam lernis Esperanton, en kelkaj okazoj kvin jarojn aŭ eĉ pli. Mi ne diras per tio ke la BEKlernantoj havis samaltan nivelon! Tute ne. Tamen ili kapablis daŭrigi la lernadon en la duagrada kurso, kaj kun pli da sperto kaj praktiko ili estos same bonaj uzantoj de Esperanto kiel la aliaj kiuj komencis lerni multe pli frue. La dua novaĵo konsistas el tio, ke BEK estas facile utiligebla. Speciale BEKunu kaj BEKdu. Do por la plejparto de kursgvidantoj, kiuj ne profesie instruas lingvon — kaj tiu parto en Esperantujo estas grandega — BEK estas facila. La plejparto de la kurso konsistas el demandolistoj kaj neprofesiaj instruistoj povas

facile uzi tiujn demandolistojn kaj meti la kursanojn en malgrandajn grupojn por daŭrigi la praktikadon.

Kiu lingvoinstrua metodo donas la bazon de via kurso?

Dum la instrua parto de la kurso, kiam la kursgvidanto klarigas la gramatikon aŭ vortojn, oni povas uzi iun ajn metodon: la tradukan, rektan, agmetodan, ne gravas. La ĉefa afero estas komprenigi efike kaj rapide la novan gramatikaĵon. Poste, dum la praktikado mi multfoje rekomendas la Valencian Metodon. Sed tiu metodo ne estas deviga. Se la instruisto trovas alian manieron praktikigi la instruitan gramatikaĵon des pli bone! Sed, la kursgvidanto ĉiam devas praktikigi la lernitan gramatikon. La nova gramatiko estas praktikenda. Tiu principo de praktikado estas grava bazo de la BEKkurso. Dum pli ol 90% el la leciona tempo la gelernantoj praktikas. Dum tiu tempo ili ne lernas novajn gramatikaĵojn, ili uzas nur tion, kion ili jam vidis. Mi deziras denove substreki, ke la kursgvidanto povas uzi iun ajn metodon por praktikigi, sed tiu praktikado devas plenigi preskaŭ la tutan tempon, kaj ĝi devas okazi nur esperante — ne estas momentoj por traduki aŭ krokodili! Krome, mi pensas, ke la praktikado devas esti grandparte en la manoj de la gelernantoj mem, en grupetoj, por ke ili povu maksimumigi la meznombran paroltempon.

Ĉu vi prezentus la ĉefajn principojn de tiu ĉi metodo, verŝajne ne sufiĉe konata ekster Hispanio?

Mi povas prezenti la Valencian Metodon jene: Post la instruado de iu gramatikaĵo, ekzemple, ĉu + jes (+ ne) (la dua leciono de BEKunu), la lernantoj grupiĝas en aroj da 2-5 personoj. Post la grupiĝo la lernantoj faras tutan demandoliston el proksimume 20 demandoj. Tiuj demandoj ĉiam uzas la novan gramatikaĵon kaj reuzas la malnovajn. Dum tiu unua paŝo ĉiu lernanto rajtas rigardi kaj legi la demandojn kiam ili devas respondi. Post kiam la lernantoj faras la tutan liston de demandoj unufoje, ili refaras la tutan liston duan fojon. Dum la dua fojo, tamen, nur la lernanto kiu legas la demandon rajtas rigardi la demandoliston. La aliaj devas respondi sen rigardi, tio estas, ili uzas nur sian memoron por trovi la respondon al la demandoj. Interkrampe, la procedo de la Valencia Metodo tute kontraŭstaras principojn de la Komunikativa Skolo de lingvolernado. Laŭ la Komunikativistoj, estas stulte kaj senmotivige starigi demandojn al lernantoj kiam la demandanto jam konas la respondon (la ideo estas: kial entute starigi demandon se vi jam scias tion, kion la respondonto diros?). Tamen, kvankam mi diplomiĝis pri lingvoinstruado kie la plejparto el la lingvoistruistoj estis ĝisostaj Komunikativuloj, mia propra sperto kaj eksperimentoj montras iom pozitive, ke multaj lernantoj tute ne senmotiviĝas pro la fakto, ke la plejparto de la demandoj en la BEKkurso havas jam konatajn respondojn. (Simpla ekzemplo, en la dua leciono estas la demando: "Ĉu Madrido estas en Hispanio?" Estas klare, ke la demandanto jam scias, ke la respondo estas jesa.) Ĝuste kial la Valencia Metodo ĝis nun sufiĉe bone

funkcias uzante kontraŭkomunikativajn principojn devas klarigi la Komunikativa Skolo!

Kiel konsilisto pri lingvolernado por usonaj lernejoj kaj universitatoj kaj rektmetoda instruisto de Berlitz-lernejoj vi verŝajne havas vastan superrigardon pri la abunda merkato de instrumetodoj. Ĉu vian kurson vi opinias la plej bona en Esperantujo.

Ne. Por juĝi kurson oni devas unue prikonsideri la celatan lerngrupon. BEK tute ne taŭgas por infanoj, ekzemple. Ĝi ne taŭgas ankaŭ por kursoj kiuj daŭras malpli ol cent horojn. Ĝi povus esti uzata por lernantoj inter 13 kaj 18 jaroj sed mi dubas pri la efikeco, ĉar ĉiu lando havas sian propran eduksistemon kaj BEK eble tute ne enkadriĝos en multe el ili. BEK lamus ankaŭ por unulingvuloj kies gepatra lingvo havas nenian historian rilatan kun eŭrop-devenaj lingvoj, kiaj la ĉina aŭ japana, ekzemple. Aliflanke BEK estas tre bona solvo por la eventuala problemo, ke subite firmaoj kiel IBM aŭ Philips aŭ Sony deziras fari eksperimenton por vidi ĉu Esperanto povos helpi al ili. Se iu el la firmao Microsoft telefonos al mi morgaŭ demandante, ĉu mi povos starigi unumonatan kurson en Novjorko kiu daŭros 8 aŭ 10 horojn tage, mi povos tuj jese respondi. Ne estos problemo. Do en tiaj situacioj BEK estas unu el la plej bonaj kursoj. BEK estas bona kurso ankaŭ por multaj lokaj grupoj kiam ne estas tie profesia instruisto por gvidi la kursojn. Plie, mi hipotezas, ke BEK estas tre bona kurso por emeritoj, ĉar BEK estas samtempe tre aktiviga kaj tre pensiga, do bona kurso por tiaj emeritoj kiuj ŝatas lingvistike gimnas-tikigi kaj tikli la lingvocentron de la cerbo.

Kio igis vin krei propran metodon? Ĉu la jam konataj ne kontentigis vin?

Fakte estis interesa hazardo. Antaŭ 12 jaroj, en la proksimeco de Valencio oni invitis min fari staĝon por montri la bonajn metodojn por instrui lingvon, sed du aŭ tri tagojn antaŭe mi perdis la voĉon, mi tute ne povis paroli. Do, unue mi ne sciis kion fari. Lasi la tutan aferon mi ne volis. Mi havis alian ideon: mi skribis la demandojn kiujn oni kutime uzas, kaj poste mi donis tiujn demandojn al Ramono, al Pedro — al personoj kiuj neniam instruis — kaj petis ilin starigi la demandojn en malgrandaj grupoj dum mi povis rondiri kaj kontroli la laboron. Poste mi konstatis, ke tio multe pli bone funkciis, ol mia kutima "teatra" laboro. Mi konvinkiĝis pri tio, ke mia vera laboro estas ne doni la plej bonan lecionon en la tuta mondo, sed trovi metodon taŭgan por neprofesiaj instruistoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povas profesiiĝi pri la lingvoinstruado.

Se mi bone komprenis la gruplaboron gvidas neprofesiaj esperantistoj. Ĉu vi povas esti certa pri tio, ke la respondoj, donitaj al la demandserio estas korektaj, servas progreson kaj ne misinstruas?

Feliĉe Esperanto estas sufiĉe simpla lingvo por ke la gelernantoj povu mem kontroli la ĝustecon de la respondoj, kaj kutime la gramatikaĵo estas ĉe la supra parto de la paĝo, do okaze de duboj oni tuj povas kontroli la ĝustecon. Tamen

la ebloj estas limigitaj, kaj la kunlernantoj povas atentigi unu la alian pri la eventualaj eraroj.

Ĉu la grupoj estas heterogenaj aŭ homogenaj?

Por uzi la Valencian Metodon mi preferas homogenajn grupojn, sed ne gravas tiom, ĉar ĉi tiu metodo estas ege fleksebla. Ĉi-jare, ekzemple, mi estis la ununura instruisto kiu restis ĝis la fino de la staĝoj en la Kastelo de Grésillon. La aliaj instruistoj jam foriris antaŭ la fino de la staĝoj. Pro tio mi havis, laŭ lingvoniveloj, la unuagradan, duagradan, kaj triagradan kursojn samtempe! Kion fari? Mi uzis la demandolistojn de la Valencia Metodo kaj la novaj lernantoj legis la demandojn dum la spertaj respondis sen rigardi. Estas tre facile legi demandojn de BEKtri kaj BEKkvar, sed estas tre malfacile, kelkfoje, respondi al tiuj demandoj. Do eĉ kun tre malsamaj niveloj en la grupo, kelkfoje estas eble funkciigi grupon je kontento aŭ almenaŭ je kontenteto de ĉiuj ĉar tiuj kiuj havas malaltan nivelon povas legi la demandon (tre facila tasko) dum tiuj kiuj havas altan nivelon povas respondi (kelkfoje, tre malfacila tasko). Konklude, en kelkaj situacioj eĉ malsamniveluloj povas sukcese partopreni la saman lecionon.

La instruista laboro estas fakte pli-malpli ripozo. Kion vi fakte faras dum viaj staĝoj?

La staĝoj, kiujn mi mem gvidas, havas duoblan celon. Unue: instrui la lingvon por veraj komencantoj kaj due: prezenti la funkciadon de la metodo. La iamaj BEK-kursanoj dum la sekva staĝo fariĝas instruantoj kaj ili mem gvidas, organizas la praktikadon de la lingvo. Por bone instrui laŭ tiu ĉi metodo oni partoprenu unu-dusemajnan staĝon, sed ankaŭ dum unu tago oni povas akiri sufiĉajn imagojn pri la metodo mem kaj poste per propraj ideoj memstare uzi la kursmaterialon. La ĉefa tasko de la kursgvidantoj estas ekzercigi la gramatikaĵojn kaj ne klarigi ilin, ja ĉiuj ekzercoj estas jam skribitaj kaj ordigitaj.

Ĉu oni ŝatas tiom da ligiteco?

Estas vere, ke estas multe da ekzercoj de la Valencia Metodo, kiuj ne lasas multe da ebleco uzi la lingvon kreive, fantazie. Sed ni konsideru, ke eĉ ĉe la komenco en BEKunu la duono de la ekzamenetoj (estas 26 entute) estas liberaj. Tio estas, la lernantoj skribas ion ajn, kion ili volas pri iu temo. En BEKdu la plejparto de la demandolistoj uzas tre longajn respondojn. Ne plu sufiĉas en BEKdu kaj tute ne sufiĉas en BEKtri kaj BEKkvar, ke la gelernantoj kontentiĝu nur per bona gramatika respondo. Por bone respondi al demando ili devas aldoni minimume tri-kvar frazojn fantazie. Do, se en BEKunu la demando, "Ĉu vi estas lernanto de Esperanto?" respondiĝas per "Jes, mi estas lernanto de Esperanto." En BEKtri, se estus la sama demando, la respondo devus esti multe pli longa laŭ la plaĉo, fantazio, scio, kaj imagpovo de la lernanto. Iu respondo al la demando "Ĉu vi estas lernanto de Esperanto?" povus esti "Jes, mi estas lernanto de Esperanto. Mi eklernis Esperanton antaŭ tri semajnoj, kaj mi pensas, ke ĝi estas facila lingvo. Mi iam lernis la rusan lingvon, sed ĝi ne

estas facila, tamen la instruistino kiun mi havis estas tre bona. Nun mi esperas, ke mi iĝos bona parolanto de Esperanto. Por fari tion mi devas praktiki multe kaj legi multe."

Kiuj estas la gramatikaj ŝtupoj, kiujn vi nepre pritraktas dum via kurso?

En **BEKunu** troviĝas la gramatiko, kiun oni bezonas por esprimi sin simple. Plejparte la enhavo similas al la tradicia Cseh-kurso: simplaj frazoj, multe da *ĉu*-demandoj, *-is -as* kaj *-os*-demandoj kun *kie, kiu(j)(n), kio(n), kia(j), kiom da, kiel* ktp. Estas en BEKunu nur du aŭ tri ekzercoj kiuj uzas subpropoziciojn, nome tiuj kiuj uzas la vortojn *kial, do*, kaj *(pensas), ke*. Tute ne tradicia tamen, estas la fakto, ke dum la leciono la prefiksoj kaj sufiksoj estas tute ne pritraktataj! Nur post leciono 30, preskaŭ ĉe fa fino de BEKunu, komencos la lernantoj studi la esperantan morfologion en la hejmtaska libro; la instruisto neniam instruas afiksojn — ilin la lernantoj vidas hejme kaj tie ili faros proksimume 1000 ekzerc-demandojn uzante nur Esperanton.

En **BEKdu** troviĝas pli kompleksa gramatiko. La plejparto de tiu kurso pritraktas subpropoziciojn. Ĉi tie BEK diverĝas de la tradiciaj kursoj tial, ke estas abundegaj ekzercoj kiuj devas uzi subpropoziciojn en la respondoj. Ekzemple, nur por la rilataj pronomoj (kiu, kiuj, kiun, kiujn) estas kvin lecionoj kaj pli ol cent demandoj. Estas ankaŭ ses aliaj lecionoj por subpropozicioj uzantaj *kies, por, se, por ke, kie, kien*, prepozicio + rilatpronomo. Plie, en la ekzercoj pri aliaj gramatikaĵoj, tiuj subpropozicioj enŝoviĝas. Ekzemple, en la leciono por instrui komparacion (*pli ol, tiel kiel, malpli ol ktp*) estas tia ero (pri bildo de familio): *Bonvolu doni al mi la nomon de la familiano, kiu estas la plej harhava!* Estas notinde, ke dum la lernanto praktikas la subpropoziciojn, samtempe li revidas kaj reuzas la gramatikaĵojn jam lernitajn en BEKunu. Ĉiama principo de BEK estas, ke eĉ lernante novajn gramatikaĵojn, la lernanto devas samtempe repraktiki jam lernitajn gramatikaĵojn.

En **BEKtri** la fokuso de la kurso ŝanĝiĝas. Dum BEKunu kaj BEKdu la lernantoj lernas paroli Esperanton, en BEKtri kaj BEKkvar ili pristudas pli la skriban kaj legan Esperanton. Do, la lasta duono de la BEKkurso ne multe aldonas al la parolkapablo de la lernanto, sed ĝi preparas lin por serioza legado, kaj malŝlosas la Vortaron PIV, kiu uzas multe da tiklaj gramatikaĵoj. BEKtri rekte atakas la alproprigon de la *-ig* kaj *-iĝ* sistemo de Esperanto. En BEKtri pli ol 40% el la paĝoj estas dediĉitaj al la studo de *-ig* kaj *-iĝ*. Troviĝas aliaj gramatikaĵoj, ekzemple, estas longa kvinpaĝa ekzerco pri aliaj rilat-subpropozicioj, kiaj *ĉio kio, ĉiuj kiujn, ion kio, neniu kiu* ktp. Tiuj ekzercoj helpas ripeti BEKdu kaj samtempe pliprofundigas la konon pri alispecaj rilatsubpropozicioj uzataj kiel subjektoj, rektaj objektoj, kaj cirkonstancaj komplementoj. Ankaŭ estas longa, eble tro teda, ekzerco pri subpropozicioj de tempordo uzante la subjunkciojn *post kiam, antaŭ ol, kiam*, kaj *dum*. Tiuj ekzercoj estas tamen gravaj, ĉar ili glatigos la malfacilan studon de la participoj en BEKkvar. Inter la kelkfoje malfacilaj ekzercoj pri *-ig* kaj *-iĝ* estas aliaj

multe pli simplaj ripetaj ekzercoj kiuj plejparte uzas nur la gramatikon de BEKdu. Tiuj simplaj ekzercoj estas nemalhaveblaj, ĉar kvankam ili ne instruas novajn gramatikaĵojn, tamen ili helpas la lernanton paroli pli kaj pli flue — alia ĉefcelo de la BEKkurso.

BEKkvar estas la kulmino de la kursaro. En ĝi troviĝas plejparte la participa sistemo de Esperanto. Sed kontraŭe al la plejparto de tradiciaj E-kursoj, la aktivaj kunmetitaj verboj tute ne troviĝas (tamen, ili estos menciitaj en la hejmtaska libro). Aliflanke, BEKkvar pritraktas la alian participsistemon multe pli ol multaj tradiciaj kursoj. Pli ol 50% el la ekzercoj rekte tuŝas la participojn: adjektivajn, adverbajn, kaj substantivajn. Ĉefe la lernanto lernas traduki el Esperanto en Esperanton la participojn. Do la lernanto rekte rilatigas tion, kion li lernis en BEKdu kaj BEKtri kun BEKkvar. Kelkaj ekzemploj klarigos la ideon: Vidante la participon *dormante*, la lernanto rapide tradukos *dum li dormis*. Kun *dorminte*, li pensos, *post kiam li dormis*, kaj kun *dormonte*, *antaŭ ol li dormis*. Same kun la substantivaj kaj adjektivaj participoj, kiaj *manĝanta* kaj *manĝinta* ktp. En BEKkvar, do, la lernanto lernas, ke la participa sistemo estas ege grava, kaj sen sufiĉe profunda kono de tiu sistemo, li, laŭ la filozofio de BEK, restos eterna komencanto, ĉar bonaj aŭtoroj uzas la participan sistemon regule, kaj en PIV, la participoj (mi ne parolas ĉi tie pri kunmetitaj verboj) kaj *-ig* kaj *-iĝ* vortoj povas esti uzataj ĝis 50-foje sur unu paĝo! Paradokse, sen sufiĉe profunda scio pri tiaj gramatikaj temoj, estos esperantistoj kiuj eble flue parolos, sed samtempe povas resti analfabetaj rilate la legadon de la ĉefvortaro de Esperanto, por ne paroli pri tuta serio de literaturaj verkoj, kie kelkfoje abundas tiaj gramatikiloj. Ŝajnas al mi, ke tiu paradokso estas iom diskutinda.

Al kiuj gramatikaĵoj vi dediĉis en via programo apartan atenton?

Estas multaj sed tamen eble la tri plej gravaj estas la *subpropozicioj*, la *-ig kaj -iĝ sistemo* kaj la *participoj* (ĉefe sen la verbo *esti*). Mi kredas, ke en la plejparto de nuntempaj esperantaj kursoj oni ne dediĉas sufiĉe da atento al tiuj gramatikaĵoj. Kiel vi tutprave diris antaŭe: "Ne sufiĉas nur aŭskulti la skemon de la gramatiko de Esperanto, sed nepre necesas praktikado de ties formoj, vortoj kaj strukturoj." Se estas multe da eraraj ideoj en la BEKkurso, ĝi almenaŭ pravas kiam ĝi ripetadas, emfazas kaj substrekas, ke oni bezonas multe pli da tempo por lerni kaj bone uzi tiujn tri gramatikajn elementojn ol la esperantistoj nun opinias. Pro tio, mi pensas, ke la kursoj devas daŭri eble duoble pli longe ol la nuntempaj, kaj eĉ pli. Mi ne deziras diri per tio, ke E-o estas malfacila lingvo. Tute ne. Sed ni ne pensu, ke kurseto sufiĉas por regi la lingvon. Ne miksu la bonajn rezultojn de esperantaj lingvolernantoj, kiuj estas lingvistoj kiel John Wells aŭ grandaj verkistoj kiel Tolstoj, aŭ talentuloj kiel Georgo Kamaĉo, kun la meznombra lernanto de E-o. La averaĝa lernanto bezonas multe pli da enleciona helpo por alproprigi tiujn tri gramatikaĵojn.

Via celo estas, ke la lernantoj enparkerigu la strukturojn, pretajn frazojn aŭ konscie uzu gramatikon?

Mia celo estas, ke ĉiuj lernantoj lernu uzi la gramatikon ĝis tia grado, ke ili kapablu krei novajn frazojn kaj ideojn uzante Esperanton. Mi deziras senkatenigi la gramatikan pensadon de la lernantoj. Mi deziras, ke ili uzu la lingvon tiel, kiel ili ŝatas aŭ volas. Sed ankaŭ mi pensas, ke antaŭ ol alveni al tiu supera libera nivelo, ili bezonas parkere lerni strukturojn kaj praktiki ili pli ol sufiĉe por ke tiuj strukturoj estu aŭtomataj. *(Daŭrigota)*

El niaj metiejoj

Ulrich Matthias: Ideoj por konversacioj

Gvidante konversacian kurson, oni prefere unue interkonatigu la partoprenantojn. Tiucele mi kompilis folion por disdonado al la kursanoj. Ĝi uzeblas en du manieroj: Unue la kursestro povas fari surbaze de ĝi demandojn al la partoprenantoj. („Kiel vi nomiĝas? Ĉu vi havas gefratojn? Ĉu vi havas hejmbestojn?...). Due, la kursanoj povas dividiĝi en parojn kaj demandi unu la alian pri iu el la sep diversaj temoj, por ke fine ĉiu prezentu sian partneron al la aliaj. Precipe tiu ĉi dua ebleco montriĝas ĉiam agrabla kaj amuza; foje la kursanoj tute ne volas ĉesigi la intervjuadon. Jen la teksto de la menciita folio:

1. Vi kaj via familio

nomo; naskiĝtago/aĝo; gefratoj, gepatroj, geavoj, geonkloj, gekuzoj, infanoj, edz(in)o, genepoj;
hejmbestoj: hundo/ kato/ kuniklo/ hamstro/ kobajo/ birdo/ fiŝo... ;
profesio/ lernejo/ studfako; en la ...a klaso/studsemestro; granda/ malgranda firmao/ lernejo/ universitato; mi (mal-) ŝatas la laboron/ lernejon/ universitaton

2. Viaj hejmo kaj urbo

domo (granda/ malgranda), loĝejo/ ĉambro, loĝas sola/ kun ... ; televidilo/ telefono/ komputilo; ĝardeno kun floroj/ legomoj/ fruktarboj;
urbo (metropolo/ grandurbo/ urbeto/ vilaĝo, kun ... enloĝantoj);
mi studas/ laboras en ... ; la gepatroj loĝas en ... ; mi naskiĝis/ loĝis en ...; la urbo estas apud ...; ĝi estas bela/ malbela, nova/ malnova urbo; ĉe la rivero ... / en la montaro... / en ebena regiono; vidindaĵoj: kastelo, preĝejoj, ...;
en la centro/ ĉe la urborando; en mia urbo estas ... esperantistoj

3. Libertempo kaj hobioj

mi satas kanti/ danci/ promeni/ televidi/ pentri/ foti/ legi/ skribi leterojn;
mi ŝatas viziti kinejon/ koncertojn/ muzeojn/ teatron/ bestoĝardenon;
muzikinstrumentoj: gitaro, violono, fluto, piano, akordiono;
mi ŝatas aŭskulti rokmuzikon/ klasikan muzikon;

mi kolektas poŝtmarkojn/ bildkartojn/ telefonkartojn/ fosiliojn/ monerojn;
sporto: naĝi/ bicikli/ kuri; ludi futbalon/ flugpilkon/ (tablo-)tenison;
mi interesiĝas pri literaturo/ arto/ historio/ politiko/ medioprotektado/ filozofio/ psikologio/ religio/ aliaj kulturoj/ matematiko/ lingvoj;
mi havas leteramikojn en ...

4. Vojaĝoj

mi jam vojaĝis al Germanio/Francio/Italio/Aŭstrio/Britio/Pollando/ Ĉeĥio/Hungario; mi plej ŝatas vojaĝi al ...;
mi preferas la maron/la montaron/ la naturon/ malnovajn urbojn;
mia lasta/ venonta vojaĝo ...; mi vojaĝis kun ... per ...

5. Lingvoj

mi parolas 1a anglan/ francan/ germanan/ italan/ hispanan/ latinan;
mi parolas la ... iomete/ malbone/ bone/ flue; mi povas nur legi la ... ;
mi lernis la ... dum .... jaroj en la lernejo;
mi eklernis Esperanton antaŭ ... tagoj/ semajnoj/ monatoj/ jaroj; mi aŭdis pri E-o de amik(in)o/ gazeto/ radio/ televido/ libro/ afiŝo/ lernejo/ instruist(in)o;
mia patr(in)o/ frat(in)o/ amik(in)o ankaŭ parolas Esperanton;
mi partoprenis kurson en Esperanto-grupo/ en lernejo/ korespondan kurson/
mi lernis sola; mi jam (ankoraŭ ne) veturis al Esperanto-renkontiĝo (IS/ IJK/ IJF/ IJS/ UK/ KET/ MEJS/ KISO);
mi estas membro en GEJ/ GEA/ IEJ/ HEJ/ CEJ/ JEB/ TEJO/ LIEA/ IKLIE

6. Veturado

mi ofte veturas per biciklo/ aŭto/ buso/ tramo/ trajno/ aviadilo/ ŝipo/ mi iras piede; al la lernejo/universitato/laborejo mi iras per ...; ĝi estas ... km-ojn for;
mi (ne) havas aŭton/ konduklicencon; mi (ne) volas havi aŭton en la estonteco

7. Manĝoj kaj trinkaĵoj

mi matenmanĝas je la ... horo; mi manĝas muslion/ bulkojn/ panon/ maiz-flokojn; mi tagmanĝas je la ...; mi ofte manĝas hejme/ en studenta manĝejo/ en restoracio; mi ŝatas italajn/ ĉinajn/ hindajn restoraciojn;
mi (ne) ŝatas kuiri; en mia hejmo kuiras mi/ mia patr(in)o;
mi vespermanĝas je la ...; mi (ne) estas vegetarano;
mi (ne) ŝatas kafon/ teon/ lakton/ sukon/ kolaon/ limonadon/ bieron/ vinon/ brandon; mi (neniam/ malofte/ ofte) trinkas alkoholaĵon

Françoise NOIREAU: LA TESTUDO PAROLANTA

La sekvan ekzercon vi povas proponi al plenkreskaj gelernantoj en la dua jaro de la lernado, sendepende de la metodo, kiun vi jam uzas. La ekzercantoj estu duope, la ekzerco daŭru 30 minutojn, kaj ĝin sekvu komuna korektado. Vi povas uzi parton de la legaĵo en la posta leciono de via kutima lernolibro; forigu la verbojn aŭ ĉiun duan verbon aŭ alian gramatikan kategorion.

Antaŭlonge, kiam la nigruloj **rikis** ankoraŭ sklavoj, **rikis** inter ili nigrulo, kiun oni **rikis** John. Li **rikadis** akvon en farmo. Li **rikis** la longan vojon de la rivero ĝis domo kun du siteloj ĉiutage tridek fojojn.



Desegno de Suzana Somfai (Pápa, Hungario)

Li havis malbonan sorton. Kiam foje ĉagreniĝinte li atingis la riveron, dum la **rikado** li daŭre ripetadis: — Al mi jam tro sufiĉas, ĉiutage mi **rikiĝas** pro **riko** de akvo, nur laciĝas **rikante** la akvon.
Kiam ĝuste li tiel **rikis**, li **rikis** testudon sur arbotrunko, kiun **rikis** la akvo al la bordo.

Kaj la testudo **ekrikis**:— Nigra homo, vi parolas tro multe.

Tiam John ĵetis la sitelojn teren, senspire **hejmenrikis**, kaj **rikis** al sia mastro blanka, ke **rikas** sur la bordo testudo **rikanta**.

— Ne eblas. Ja la testudo **rikas** muta kiel fiŝo!

— Ne **rikas** muta. Kredu, ke tiu testudo sur la bordo **rikas**! — **rikis** John.

Ekrikis ankaŭ la farmbienulo al la rivero, por **riki** la strangan testudon. Sed **rikis** al la nigrulo:

— Se vi trompas min, mi batigos vin! John ne **rikis** la baton. Li **rikis** la voĉon de la testudo per siaj oreloj. Kiam ili **rikis** la riveron, la testudo vere **rikis** sur la arbotrunko. Sed ĝi retiris sian kapon suben. John alparolis:

— Testudo, mi **rikas** vin, **riku** ankaŭ al mia mastro, kiel al mi!

La testudo nur sidadis, eĉ unu vorton ne **rikis**. John petis, **rikegis** ĝin. Fine la farmbienulo **rikis** sian paciencon. Ili **rikis** hejmen. Hejme li ordonis **riki** sian sklavon kaj riproĉis lin:

— Ĉu vi bezonis ĉi tion? Kaj nun kuregu, **rikadu** la akvon plu!

Kiam John **rikis** la riveron, la testudo denove **elrikis** sian kapon. Kun siaj saĝaj okuloj **rikis** al John, kaj **rikis** kun signifplena voĉo:

— Ĉu vi **rikas**, nigra homo, mi ja **rikis** al vi, ke vi **rikas** tro multe.

Laŭ teksto rikita el ***Homo kaj Besto***, legolibro por komencantoj de Jozefo NÉMETH (ĉe Departementa Komitato de HEA en Szombathely, 1985).

Laŭ ekzerco rikita ***el L'enseignement des langues, théorie et exercices pratiques*** de Françoise CORMONT ĉe Chronique Sociale, 1992.

Riku la radikojn kaj petole distriĝu, tion deziras al vi *Francoise Noireau (Les Pommiers 14 B, chemin de la Tour, F-05100* ***Briançon****, Francio)*

Miklós Fehér: **Instruado per poemoj**

Jam la 2-3-jaraj infanoj volonte lernas kaj deklamas-kantas poemetojn, kantotekstojn, 5-6 jaruloj jam povas ekŝati pecojn de la nacia poezio. Ili volonte lernas poemojn ankaŭ en la lernejo, tiel bonrezulte, ke la plej ŝatatajn ili ĝismorte rememoras. Ĉi tiun poemŝatemon proponas mi uzi en la lingvoinstruado. Se la infanoj atingis jam iometan lingvoscion, oni kuraĝe surtabligu por ili bonegan tradukon de poemo, kiun ili nacilingve ŝatas, parkere scias. Se la esperantigo estas eminenta, la infanoj ĝojplene rekonos ĝin tuj post la eklego, kaj ili volonte lernos tiun ankaŭ en E-o. Por la fiksa lingvoscio necesas parkerigitaj tekstoj.

Tial mi havas peton al Vi, karaj pedagogoj: eksciu, kiujn nacilingvajn poemojn ŝatas la infanoj, kopiu tiujn, poste skribu ilin tiel, ke sub ĉiu verso staru ĝia preciza, laŭvorta, kruda esperantigo kaj laŭeble la signoj de la ritmo. Se troviĝas jam esperantigo de la poemo, sendu ankaŭ tiun, kun la nomo de la tradukinto. Ni kontrolos la tradukon kaj — se necese — proponos korektojn, kaj aperigos la tradukon en nia periodaĵo *Eŭropa Poezio en Esperanto*. Ni petos kritikojn, novajn proponojn, kaj ĉi-metode naskiĝos tiuj eminentaj tradukoj, kiuj havas jam en E-a vesto la saman efikon al la infanoj, kian la originalo. Se mankas la traduko, ni faros ĝin.

Lingvo sen vivanta poezio ne estas vivkapabla! Vivanta poezio postulas ne nur poetojn, tradukistojn, sed ankaŭ kritikistojn kaj ĉefe poemŝatantan publikon. Per nia metodo edukiĝos ĉiuj tri. Al tiu strebo bonvolu esti helpemaj. Sendinto de uzebla peco ricevos honorekzempleron, en kiu aperis lia/ŝia sendaĵo!

Eŭropa Poezio en Esperanto estas kvaronjara fakperiodaĵo, kiu strebas esperantigi kaj publikigi la kremon de la Eŭropa poezio sur la plej alta nivelo. En la unuaj kvar numeroj (unua jarkolekto) aperis 52 poemtradukoj el 8 diversaj lingvoj kaj tial ne el pliaj, ĉar mankas materialo. Provnumero al Hungario kostas 90 forintojn, al eksterlando du internaciajn respondkuponojn. La plej multekosta estas la poŝtkotizo, tial estas favore mendi tutan jarkolekton (kvar sinsekvajn numerojn) en unu sendaĵo. Prezoj: al Budapeŝto 300 forintoj, al Hungario province 320 forintoj. Al najbara lando 4 IRK-oj, al nenajbara lando 5 IRK- oj. Aerpoŝto postulas plusan 1 IRK-on. Bonvolu mendi ĉe mi:

dr. Miklós FEHÉR*, Budapest, Ugró Gyula 17, H-1046, Hungario*

Kiel mezuri lingvoscion?

Ĉar ni konscias pri tio, ke praktiko laŭ la signifo superas ĉiujn teoriojn, ni trovas utila aperigi de tempo al tempo — kiam la cirkonstancoj permesos — materialojn, kiuj venas al ni de kolegoj, kaj kiuj estas fruktodone utiligeblaj en nia ĉiutaga laboro, en klasĉambro aŭ dum E-kursoj. Ni publikigos ilin ne por tiu celo,

ke ili estu ĉiam servile kopiitaj, sed tial, ke vi vidu, kiun vojon iras certa kolego, kaj ĉerpinte el la akiritaj spertoj ĉiu ekhavu ideojn por pliriĉigi sian repertuaron.

Niaopinie necesis la ĉi-supraj vortoj antaŭ la testo, kiu estas pruntita el la trezoro de nia hungara kolego, s-ro Géza Kurucz, kiu de 33 jaroj instruas nian lingvon preskaŭ seninterrompe. Se la prezentota taskfolio kaptos ies fantazion, la testo estos aplikebla al multaj taskoj kontrolcelaj. Laŭ lia sperto la lernantoj volonte solvas similajn testojn. (Solvo sur la lasta paĝo.) *La Red.*

KIU FRAZO ESTAS GRAMATIKE ĜUSTA?

A) Ambaŭ frazoj estas ĝustaj.
B) Neniu frazo estas ĝusta.
C) Nur la unua frazo estas ĝusta.
D) Nur la dua frazo estas ĝusta.

1. 1. Mia avo estas dek jaroj pli aĝa ol la avino.
   2. Nia tuta familio pasigis du semajnojn en Bulgario.
2. 1. Tutan dimanĉon ni ripozis en ĉarma eksterurba arbaro.
   2. La soldato eniris la drinkejon.
3. 1. Li ne lasis min eniri en la antaŭĉambron.
   2. Mi konsideris min kiel mia malamiko.
4. 1. Ĉu vi vidis la knabojn veni hejmen?
   2. Saluton, sinjorino. Kiom da viandon vi deziras?
5. 1. Kiam vi venos hejmen? Ĉu je la 8-a vi estos hejme?
   2. Ĉu ankaŭ vi naskiĝis en marto? Kioma de marto?
6. 1. Ĉu vi havas ankoraŭ pli ol cent frankoj?
   2. Saluto! Kie vi estis hieraŭ? Ĉu okazis al vi io malagrabla?
7. 1. Li atendis nur 2-3 minutojn, tamen li koleris.
   2. Atenton! Atenton! Trajno el Berlino alvenos al la 3-a kajo.
8. 1. Post unu semajno mi vizitas la parencojn en Outreau.
   2. Emeriko, bonvolu doni al mi peceton da pano.
9. 1. Li sukcesis fiŝhoki siluron longan duonmetro.
   2. Kiel instruisto li estas tre severa.
10. 1. Ivano estas aŭdaca, li timas absolute nenion.
    2. Mi petis sinjoro Schmidt, ke li helpu min.
11. 1. Ĉio ĉi okazis du tagojn antaŭ nia forveturo al Transilvanio.
    2. Li dikiĝis. Nun li pezas je 15 kilogramoj pli ol ĉe la edziĝo.
12. 1. Ĉiun tagon li aĉetas ĵurnalon ĉe tiu butiko.
    2. Nu diru, kion vi aŭdis ĉe ili.
13. 1. La finon de la semajno ili estis ĉe nin.
    2. Viktoro, restu ankoraŭ ioman tempon.
14. 1. Johano, ĉu vi havas krajono aŭ feltoplumo?
    2. Petro estas poeto. Kaj Adamo?
15. 1. Mi rapidas, ĉar la gepatroj kuŝas hejme malsane.
    2. Tio estas la biciklo de via amiko Andreo.
16. 1. Ĉu ankaŭ vi naskiĝis la 21-an de marto 1978?
    2. Hodiaŭ estas la 28-a de novembro, ĉu ne?
17. 1. Jen vidu, Jozefo ne havas nek krajonon nek libron.
    2. Mia frateto neniam havas nek libron nek kajeron.
18. 1. Tamara kaj sia amiko vizitis teatron.
    2. La patro venis hejmen kun du siaj kolegoj.
19. 1. La onklo de mia amiko parolas tri lingvojn.
    2. Mi parolas nur en la gepatra lingvo.
20. 1. La kamparo estis plenplena de belaj floroj.
    2. Kara amiko, mi tutkore vin dankas la leteron kaj la bildkartojn.

El la landoj kaj sekcioj

Ĉinio

Kun la helpo de la gvidantoj de la tria elementa lernejo de Zhongguancun en Pekino, Esperanto Asocio de Ĉina Akademio de Sciencoj fondis infanan E-kurson. La kurso ekfunkciis la 17-an de julio 1995 kun la gvido de s-ro Shen Chengru. Ĝin partoprenas 45 infanoj de 7 ĝis 9-jaraj. Antaŭnelonge, la Asocio fondis similan kurson en la sama kvartalo kun la partopreno de 12 infanoj.
Ili tre ŝatus korespondi kaj renkontiĝi kun amiketoj en kaj ekster Ĉinio. Ili intencas partopreni la internacian someran kampadejon en E-o, kiun la Asocio organizos inter la 15-a kaj 21-a julio 1996. Por detalaj informoj turnu vin al: *s-ino Wang Yuchun, E-Asocio de Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, CN-100864 Beijing, Ĉinio.* ***SHEN Chengru***

Germanio

Lingvo-Orientiga Instruado (LOI) en Oberndorf/Neckar

En februaro 1975 la FEoLL-Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn komencis la LOI - projekton. La instruado daŭris du lernejajn jarojn. La gelernantoj (mi mem estis unu el ili) post dujara lernado tuj komencis studi duan fremdan lingvon. Entute 602 geknaboj partoprenis la eksperimenton. (La lasta klaso finis la lernadon en 1982.) Montriĝis, ke la geknaboj, kiuj vizitis LOI, poste en la lernado de fremdaj lingvoj havis grandajn facilaĵojn. Eĉ en fakoj kiel geografio kaj matematiko oni povis montri avantaĝojn de LOI-gelernantoj.

Laŭ tiu-ĉi Paderborna Modelo ni volis komenci novan eksperimenton ankaŭ en la kadro de la projekto FUNDAPAX, kunordigita de "Esperanto" Radikala Asocio sub la aŭspicio de UNESCO. Komence de la lernojaro 1994/1995 la elementa lernejo en Oberndorf ricevis la permeson por unujara eksperimento pri LOI. Ĉar la Ministerio rajtigis al ni nur unujaran eksperimentodaŭron, ni serĉis gelernantojn el la kvaraj klasoj de la elementa

lernejo. Komence interesiĝis 38 gelernantoj. De ili restis 20 ĝis la fino de la lerneja jaro. Mi instruis laŭ la lernolibro de Elisabetta Vilisics Formaggio (1994), kiun ŝi speciale verkis por LOI en elementaj lernejoj. La du studhoroj okazis ĉiusemajne, ĵaŭde posttagmeze, kaj entute ili havis iom malpli ol 80 studhorojn. En la instruplanado — krom la hodiaŭ kutima modelo — mi celis trovi paralelojn kun la germana lingvo por helpi al la gelernantoj ekkoni strukturojn de la propra lingvo. Montriĝis, ke tiuj gelernantoj, kies gepatra lingvo estas ne la germana, povis transpreni el la propra lingvo (turka, itala, libana, bosnia aŭ kroata) kaj gramatikajn strukturojn kaj kelkfoje eĉ vortojn. Tiel ili eĉ havis avantaĝojn, kio certe plialtigis ilian memfidon.

Mi havigis kontaktojn al la infanoj eksterlande. Ni komencis leterinterŝanĝadon kun elementa lernejo en Torino (Italio). Krome ni daŭrigis plurajn ĉenrakontojn, kiujn ni plusendis al eksterlando.

Entute mi havas la impreson, ke la instruado ne nur donis bonajn spertojn al la infanoj kaj helpos la lernadon de pluaj fremdlingvoj, sed ĝi ankaŭ plaĉis al ili. Mi ne povas laŭkvante antaŭvidi, kiom granda estos tiu lernplifaciligo. Pri tio Claus Günkel faros testojn en la diversaj lernejoj vizitotaj de miaj LOI-lernantoj. La rezultoj kontribuos al lia doktoriĝtezo daŭrigonta liajn teoriajn konsiderojn pri la optimuma daŭro de LOI. ***Ines Frank***

Titisee Str. 34., DE-78628 Rottweil, Germanio

Kubo

Perkoresponda kurso: Ĉu revo aŭ realo?

[Nur la kvinono de la interesiĝintoj — 127 el 549 — aliĝis poste al niaj korespondaj kursoj. Analizinte la rezultojn ni venis al la jenaj konkludoj:]

1. Multaj interesitoj estas duonmotivitaj aŭ perdas la intereson, post ricevo de la enkonduka leciono, kiun ni sendas al ili tute senpage.
2. Manko de sufiĉaj lernmaterialoj niaflanke. Tio de la komenco mem devigis nin prokrasti ĝian sendadon. La reago al la kurso estis multe pli granda ol ni atendis. Sekve venis kromaj problemoj kun la presado kaj reprodukto de la bezonataj materialoj.
3. Okazis problemoj ankaŭ kun la sendado de poŝtĝiroj tial, ke pluraj kurieraj oficejoj ne konsentas sendi ilin kontraŭ nur 2.00 kubaj pesoj.
4. La malbona funkciado de la poŝto plendigis multajn interesitojn, pro manko de reago al ilia peto flanke de KEA, dum ni ricevis nenion. Evidentiĝas, ke la sekcion ne atingis multaj korespondaĵoj senditaj de la interesitoj, kvankam ili certigis ĝian sendadon.

Aliflanke, ni bedaŭras la troan fidon je la ordinara poŝto. Ĉi lasta aspekto pensigis nin aliigi la vojon por ke la PKK fakte frapu la pordon de ĉiu interesito. Sekve, la strategio por sukcesigi niajn celojn estu tute alia. Tiel, kie ekzistas M-Filio ni decidis krei reton de ILEI-reprezentantoj. Ĝia ĉefa okupiĝo estus roli peranton de la PKK en la teritorio kaj en najbaraj lokoj, kie ankoraŭ ne ekzistas filioj. Tiel la Instrua Fako de KEA, kiu respondecas pri ĝi, ne plu atentos rekte la opajn interesitojn. Ĉi kaze la ILEI-reprezentanto ricevos per registrita poŝto la korespondaĵojn sendotajn de Havano. Tiu persono disdonos aŭ dissendos ilin laŭokaze. Ankaŭ la ILEI-reprezentanto enspezos la

tutan monon pro koncepto de kotizoj kaj lernomaterialoj de la enskribiĝintoj. Li sendos la koncernan procenton al la Instrua Fako. Tio helpos solvi ankaŭ la problemon menciitan en la punkto 3. Tiu proceduro stimuligos la filiojn atente prizorgi ĝian korektan funkciadon. Certe oni laboros en ĉiu municipo cele al plialtigo de la nombro da eblaj aliĝontoj.

Ĉiu reprezentanto de ILEI diskonigos inter PKK-kursanoj la monatan programon de aranĝoj, kiujn ili rajtas partopreni por senti sin pli aktivaj roluloj de la asocia vivo. Se ĉio funkcios kiel espereble, ni povas certigi, ke la Perkoresponda Kurso transiros firme kaj sukcese el reva idealo al kontentiga kaj feliĉiga realo. ***Héctor Jiménez*** (el Avanco, 1994/1-4.)

Litovio

Post dumonata kurso (80-hora), en Garliava, urbeto apud Kaunas, la kursfinintoj decidis fondi E-klubon por praktiki la lingvon. La 3-an de septembro 1995 en la aŭditorio de la urba biblioteko, la ĵus naskita klubo faris sian unuan E-aranĝo, okaze de disdono de la atestoj al la kursfinintoj. Enmanigis la atestojn, la brazila Cseh-instruisto, s-ro *Aristophio Alves Filho*.

La klubanoj deziras korespondi tutmonde kaj bonvenigas esperantaĵojn kaj esperantistojn. Ili kunsidos ĉiusabate de la 16-a ĝis la 18-a horo en ĉambro de la biblioteko. Por kontakti ilin skribu al: Esperanto-klubo „Espero de Garliava", s-ino *Aldona Grikietiene, Darbininku g-ve, n-ro 74-1, LT-4316 Garliava, Kauno raj., Litovio*.

De la 4-a de septembro ĉe LEA en Kaunas lernas E-on 84 personoj en tri klasoj, sub gvido de s-ro Alves Filho. Li daŭre akceptas proponojn por instrui E-on kaj prelegi pri Brazilo kaj pri Cseh-metodo. En Eŭropo li povas resti ĝis aŭgusto 1996. Lian aktualan adreson petu de Internacia Esperanto-Instituto, Nederlando.

Slovakio

La 4-an de marto 1993 la Ministerio pri Instruado de Slovaka Respubliko aprobis dokumenton *Instruprogramo por gimnazioj. Internacia lingvo Esperanto. Nedeviga studobjekto — unujara kurso*, sub registra numero 828/1993, kiel duan korektitan eldonon (la unua aperis jam septembre 1990). Tiel estis en Slovakio oficiale aprobita la nedeviga instruado de E-o. La tekston ellaboris prof. *Eduard Gasinec* el *Pedagogia Esplorinstituto de Bratislava*.

La teksto klarigas, kion la instruado celas (paroli, skribi, aŭskulti en E-o pri ĉiutagaj temoj, konatiĝi kun literaturo kaj historio de E-o), kion enhavu ĉiu el la 70 instruhoroj de la unujara kurso, kiuj metodoj kaj lerniloj estas disponeblaj kaj kiel taksi la sciojn de la lernantoj. Sekvas listo de aplikitaj pedagogiaj verkoj. La dokumento estas la unua hirundo sur la teritorio de la iama Ĉeĥoslovakio, sed bedaŭrinde en Slovakio mem ĝin eĉ esperantistoj ne rimarkis (recenzoj aperis nur slovaklingve, verkitaj de la aŭtoro), kaj ĝia praktika apliko

lernejo. Komence interesiĝis 38 gelernantoj. De ili restis 20 ĝis la fino de la lerneja jaro. Mi instruis laŭ la lernolibro de Elisabetta Vilisics Formaggio (1994), kiun ŝi speciale verkis por LOI en elementaj lernejoj. La du studhoroj okazis ĉiusemajne, ĵaŭde posttagmeze, kaj entute ili havis iom malpli ol 80 studhorojn. En la instruplanado — krom la hodiaŭ kutima modelo — mi celis trovi paralelojn kun la germana lingvo por helpi al la gelernantoj ekkoni strukturojn de la propra lingvo. Montriĝis, ke tiuj gelernantoj, kies gepatra lingvo estas ne la germana, povis transpreni el la propra lingvo (turka, itala, libana, bosnia aŭ kroata) kaj gramatikajn strukturojn kaj kelkfoje eĉ vortojn. Tiel ili eĉ havis avantaĝojn, kio certe plialtigis ilian memfidon.

Mi havigis kontaktojn al la infanoj eksterlande. Ni komencis leterinterŝanĝadon kun elementa lernejo en Torino (Italio). Krome ni daŭrigis plurajn ĉenrakontojn, kiujn ni plusendis al eksterlando.

Entute mi havas la impreson, ke la instruado ne nur donis bonajn spertojn al la infanoj kaj helpos la lernadon de pluaj fremdlingvoj, sed ĝi ankaŭ plaĉis al ili. Mi ne povas laŭkvante antaŭvidi, kiom granda estos tiu lernplifaciligo. Pri tio Claus Günkel faros testojn en la diversaj lernejoj vizitotaj de miaj LOI-lernantoj. La rezultoj kontribuos al lia doktoriĝtezo daŭrigonta liajn teoriajn konsiderojn pri la optimuma daŭro de LOI. ***Ines Frank***

Titisee Str. 34., DE-78628 Rottweil, Germanio

Kubo

Perkoresponda kurso: Ĉu revo aŭ realo?

[Nur la kvinono de la interesiĝintoj — 127 el 549 — aliĝis poste al niaj korespondaj kursoj. Analizinte la rezultojn ni venis al la jenaj konkludoj:]

1. Multaj interesitoj estas duonmotivitaj aŭ perdas la intereson, post ricevo de la enkonduka leciono, kiun ni sendas al ili tute senpage.
2. Manko de sufiĉaj lernmaterialoj niaflanke. Tio de la komenco mem devigis nin prokrasti ĝian sendadon. La reago al la kurso estis multe pli granda ol ni atendis. Sekve venis kromaj problemoj kun la presado kaj reprodukto de la bezonataj materialoj.
3. Okazis problemoj ankaŭ kun la sendado de poŝtĝiroj tial, ke pluraj kurieraj oficejoj ne konsentas sendi ilin kontraŭ nur 2.00 kubaj pesoj.
4. La malbona funkciado de la poŝto plendigis multajn interesitojn, pro manko de reago al ilia peto flanke de KEA, dum ni ricevis nenion. Evidentiĝas, ke la sekcion ne atingis multaj korespondaĵoj senditaj de la interesitoj, kvankam ili certigis ĝian sendadon.

Aliflanke, ni bedaŭras la troan fidon je la ordinara poŝto. Ĉi lasta aspekto pensigis nin aliigi la vojon por ke la PKK fakte frapu la pordon de ĉiu interesito. Sekve, la strategio por sukcesigi niajn celojn estu tute alia. Tiel, kie ekzistas M-Filio ni decidis krei reton de ILEI-reprezentantoj. Ĝia ĉefa okupiĝo estus roli peranton de la PKK en la teritorio kaj en najbaraj lokoj, kie ankoraŭ ne ekzistas filioj. Tiel la Instrua Fako de KEA, kiu respondecas pri ĝi, ne plu atentos rekte la opajn interesitojn. Ĉi kaze la ILEI-reprezentanto ricevos per registrita poŝto la korespondaĵojn sendotajn de Havano. Tiu persono disdonos aŭ dissendos ilin laŭokaze. Ankaŭ la ILEI-reprezentanto enspezos la

tutan monon pro koncepto de kotizoj kaj lernomaterialoj de la enskribiĝintoj. Li sendos la koncernan procenton al la Instrua Fako. Tio helpos solvi ankaŭ la problemon menciitan en la punkto 3. Tiu proceduro stimuligos la filiojn atente prizorgi ĝian korektan funkciadon. Certe oni laboros en ĉiu municipo cele al plialtigo de la nombro da eblaj aliĝontoj.

Ĉiu reprezentanto de ILEI diskonigos inter PKK-kursanoj la monatan programon de aranĝoj, kiujn ili rajtas partopreni por senti sin pli aktivaj roluloj de la asocia vivo. Se ĉio funkcios kiel espereble, ni povas certigi, ke la Perkoresponda Kurso transiros firme kaj sukcese el reva idealo al kontentiga kaj feliĉiga realo. ***Héctor Jiménez*** (el Avanco, 1994/1-4.)

Litovio

Post dumonata kurso (80-hora), en Garliava, urbeto apud Kaunas, la kursfinintoj decidis fondi E-klubon por praktiki la lingvon. La 3-an de septembro 1995 en la aŭditorio de la urba biblioteko, la ĵus naskita klubo faris sian unuan E-aranĝo, okaze de disdono de la atestoj al la kursfinintoj. Enmanigis la atestojn, la brazila Cseh-instruisto, s-ro *Aristophio Alves Filho*.

La klubanoj deziras korespondi tutmonde kaj bonvenigas esperantaĵojn kaj esperantistojn. Ili kunsidos ĉiusabate de la 16-a ĝis la 18-a horo en ĉambro de la biblioteko. Por kontakti ilin skribu al: Esperanto-klubo „Espero de Garliava", s-ino *Aldona Grikietiene, Darbininku g-ve, n-ro 74-1, LT-4316 Garliava, Kauno raj., Litovio.*

De la 4-a de septembro ĉe LEA en Kaunas lernas E-on 84 personoj en tri klasoj, sub gvido de s-ro Alves Filho. Li daŭre akceptas proponojn por instrui E-on kaj prelegi pri Brazilo kaj pri Cseh-metodo. En Eŭropo li povas resti ĝis aŭgusto 1996. Lian aktualan adreson petu de Internacia Esperanto-Instituto, Nederlando.

Slovakio

La 4-an de marto 1993 la Ministerio pri Instruado de Slovaka Respubliko aprobis dokumenton *Instruprogramo por gimnazioj. Internacia lingvo Esperanto. Nedeviga studobjekto — unujara kurso*, sub registra numero 828/1993, kiel duan korektitan eldonon (la unua aperis jam septembre 1990). Tiel estis en Slovakio oficiale aprobita la nedeviga instruado de E-o. La tekston ellaboris prof. *Eduard Gasinec* el *Pedagogia Esplorinstituto de Bratislava.*

La teksto klarigas, kion la instruado celas (paroli, skribi, aŭskulti en E-o pri ĉiutagaj temoj, konatiĝi kun literaturo kaj historio de E-o), kion enhavu ĉiu el la 70 instruhoroj de la unujara kurso, kiuj metodoj kaj lerniloj estas disponeblaj kaj kiel taksi la sciojn de la lernantoj. Sekvas listo de aplikitaj pedagogiaj verkoj. La dokumento estas la unua hirundo sur la teritorio de la iama Ĉeĥoslovakio, sed bedaŭrinde en Slovakio mem ĝin eĉ esperantistoj ne rimarkis (recenzoj aperis nur slovaklingve, verkitaj de la aŭtoro), kaj ĝia praktika apliko

en gimnazioj estas nula (almenaŭ neniu konkreta ekzemplo estas menciita en la recenzoj). Jen ekzemplo, ke ne sufiĉas, se oficialaj lokoj malfermas la pordon al esperantistoj — ni ofte ne scias utiligi la proponitajn eblojn.

Miroslav Malovec (el Starto 1995/2-3.)

Svedio

Ĉiam pli da studantoj aliĝas al la Esperanto-kursoj en la Popola Altlernejo de Karlskoga, kie ni havas Esperanto-fakon ekde 1988. 25 horojn semajne oni studas en 8-semajna komencanta kurso aŭ en samlonga daŭriga kurso. Multaj restas tutan semestron por ambaŭ kursoj.

Ĉi-aŭtune aliĝis tro da studantoj kaj la fako devis malakcepti multajn aliĝantojn kaj rekomendi novan kurson por komencantoj (8/1-1/3 -96).

Jam 33 nacianoj partoprenis en niaj kursoj kaj en ĉi tiu kurso albanino kaj japanino estas tiuj el la plej malproksimaj landoj. La plej multaj faros nian ekzamenon kaj poste kelkaj ekinstruos hejmloke.

La instruado estas tute en Esperanto kaj jam post du semajnoj la studantoj uzas Esperanton, ofte ilian nuran komunan lingvon. Ĉi-semestre ankaŭ Mazi en Gondolando estas uzata en la instruado kun multe da eblecoj buŝe kaj skribe ekzerci. La grupo vere ekŝatis la filmon!

Partoprenantoj en aliaj fakoj miras, ke oni tiel rapide povas lerni lingvon kaj multaj jam aliĝis al vesperaj kursoj por mem sperti la aferon. La fakto, ke Esperanto estas internacia popola movado por interkompreno, egaleco inter homoj kaj ilo por nova pensmaniero allogas multajn. Ankaŭ estas interese, ke jam spertaj esperantistoj foje partoprenas por ĝui restadon en vera Esperantujo kaj samtempe instigi al memstara uzado de nia Internacia Lingvo.

Lars Forsman
gvidanto de la Esperanto-fako de Karlskoga Popola Altlernejo

Reagoj

La Malfacila Esperanto.

En Internacia Pedagogia Revuo 1/95 Bernard Golden publikigis la unuan parton de sia artikol(eg)o pri la "Komplika Transitiveco en Esperanto" kaj pri tio, ke ĝi estas fonto de eraroj, eĉ por membroj de la Akademio kaj aliaj eminentuloj inter la esperantistoj. En tio Golden absolute pravas. Oni multe fuŝas, kaj nepre ne nur pri (ne)transitiveco de verboj. Eble multon ni gajnus, se la redaktoroj de esperantaj periodaĵoj estus kaj pli kompetentaj kaj pli severaj, se la tekstoj kiujn la esperantistoj legadas vere estus modelaj, se la aŭtoroj estus pli kritikemaj rilate al siaj verkoj kaj antaŭ publikigo elsarkus kaj elsarkigus erarojn. Tro ofte tio restas "pia deziro".

Kaj nun pri la verboj kaj ties (ne)transitiveco. Mi opinias, ke ni devas distingi inter verboj nederivitaj kaj verboj derivitaj. Ĉe verboj nederivitaj

transitiveco aŭ netransitiveco estas parto de la signifo de la radiko mem; ĉe verbaj derivitaj (de adjektivoj, substantivoj, adverboj, ktp.) tiel ne estas. Ĉe ĉi tiaj verboj transitiveco aŭ netransitiveco estas demando de konvencio. Tio havas konsekvencojn por aliaj derivaĵoj. Jam Zamenhof kreis problemojn. En Universala Vortaro (FdE) ni trovas, ekz., ***enu'/ s'ennuyer/ annoy/ weary/ sich langweilen /скучáть /nudzic sie***. La franca, germana, rusa kaj pola tradukoj respondas al netransitiva verbo "enui". La anglaj tradukoj ne estas samsignifaj, ne nur kun la aliaj, sed ankaŭ inter si: „to annoy" estas transitiva verbo, respondanta pli-malpli al la germana esprimo *Überdruß erregen*, kiu aperas kiel traduko de **ted'**, radiko de transitiva verbo. La anglaj tradukoj de **enu'** kaj **ted'**, „weary" kaj „tedious", ne estas verboj, sed adjektivoj. Por mi la verbo "enui" ĉiam estis netransitiva, sed laŭ PV ĝi estas transitiva. Ĝi difinas: *"Malplezuri pro senintereso aŭ neokupiteco"* kun jena ekzemplo*: "mi enuis la tutan tagon, atendante vin."* Ĉi tiu frazo, miaopinie, ne demonstras transitivecon. En "Maja Idilio" de Kalocsay, en la versaĵo "Ŝafideto" troviĝas la verso*: "Vi enuis la ŝafaron"*, signifanta: "vi enuis estante inter la ŝafoj aŭ en la ŝafaro". Do, laŭ ĉi tiu ekzemplo "enui" estus komparebla al la pli forta esprimo "abomeni" (vi abomenis la ŝafaron). Laŭ UV **abomen'** estas substantiva radiko; laŭ PV, PIV, Waringhien kaj Wüster radiko de transitiva verbo.

Alia verbo ĉi-tema, sed inversdirekta, estas la klare transitiva verbo **"naŭzi"**, kiun strangakiale PV indikas per (x). Ekzempla frazo: *tio naŭzas min*. Notinde estas, ke en neniu vortaro mi trovis la derivajon "naŭziĝi".

Estas alia grupeto de verboj iel similtemaj: ***farmi, lui, prunti***. Laŭ UV*: **farm'**/ affermer / farm/ pachten/ арендовать/ dzierzawic;* ***lu'***/ *louer (location)/ rent/ mieten /брать в наемь /wynajmowac;* ***prunt'*** */en prêntt /lent, borrowed /leihen, borgen /взаймы /pozyczać*. La unuaj du radikoj estas tiaj de transitivaj verboj: farmi bienon = farmpreni bienon; farmigi bienon = farmdoni bienon; lui loĝejon = lupreni loĝejon; luigi loĝejon = ludoni loĝejon; ĉi tie ni trovas plenan paralelecan. **Prunti** estas laŭ PV radiko de transitiva verbo kun la signifo: pruntepreni, kio respondas al la germanaj tradukoj en UV; laŭ Waringhien kaj PIV **prunt'** estas radiko de adverbo, kio respondas al la franca traduko en UV; la anglaj tradukoj en UV signifas respektive: "prunt(edon)ita" kaj "prunt(epren)ita". Laŭ PV kaj Waringhien "prunti" povas signifi kaj **pruntepreni** aŭ **deprunti**, kaj **pruntedoni** aŭ **alprunti**, kaj tio ŝajnas al mi malbona afero. Kiom mi komprenas, la rusa (kaj la pola) tradukoj en UV signifas (unuavice) "pruntedoni". Estas klare, ke ni devas scii, kia estas la karaktero de ĉiu radiko, kaj kio estas la preciza signifo de ĉiu radiko, kaj eĉ ni devas scii ĉu rekte derivita verbo estas transitiva aŭ ne, ĉar alie ni ne povas ĝuste uzi Esperanton. Se vi opinias, ke tio estas tro malfacila por la uzantoj de la lingvo, vi devas konscii, ke rezigno pri tiu postulo signifas perdon de klareco kaj fuŝan lingvuzon: Ni devas scii la signifojn (inklude la transitivecon aŭ netransitivecon) ekzemple de jenaj (transitiv-verbaj) radikoj:

komenc', fin', komplik', fals', forges', skrib', verk', far', ig', ferm', fiks', manĝ', trink', las', romp', ted', vek', demand', pet', envi', don', ricev', akir', tim'. turment' kaj de jenaj (netransitiv-verbaj) radikoj: *ĉes'; daŭr', est', iĝ', sid', star', ir', dorm', dron', viv', labor', fart', ĝoj', aper', preĝ', enu'*, kaj multaj aliaj. Laŭ PIV **danc'** estas kaj netransitiva kaj transitiva, laŭ PV nur netransitiva verboradiko. Ni notu, ke iuj netransitivaj verboj tamen povas havi kun si rektan komplementon: *Li vivas sian propran vivon. Ŝi dormas la dormon de justulo. Image li mortis jam mil mortojn, kaj tamen li vivas ankoraŭ. Ili dancis valsojn, polkojn, fokstrotojn, kaj aliajn dancojn.* Aliflanke transitiva verbo ofte ne havas objekton kun si: *Dume mi atendis, atendadis. — Ni kutime manĝas je la sesa.*

Verboj netransitivaj derivitaj de neverbaj radikoj: *feliĉi, ĵaluzi, lami, larmi, sani,* ktp.; kaj verboj transitivaj derivitaj de neverbaj radikoj: *brosi, dati, marteli, titoli, teruri.* Kvankam laŭ PV teruro signifas "timego", *terura* signifas "timegiga". Se tiel, "teruriga" estas pleonasmo. Se *terur'* estus verba radiko, *teruro* ne signifus "timego", sed "timegigo". Preskaŭ ĉiuj vortaroj instruas ke "komplika" (ofta vorto en la artikolo de Golden) estas egalsignifa kiel *"complicated", "kompliziert"*. Wüster konsekvence rifuzas tiun signifon kaj atribuas al tiu adjektivo "aktivan" signifon. Enc. V. diras:

(komplik)a 1. verwickelnd, e. Komplikation bedeutend, umständlich, erschwerend. — [2. - (komplik)ita]. Simile: **(komplik)ita** - kompliziert, verzwickt, schwierig, s.a.-a. **(fiks)a** 1. befestigend, fixierend (fiksa stifto, fiksa ideo, fikse rigardi — [2.= (fiks)ita; esti (fiks)a a. feststehen.] (Wüster indikas, ke tamen tiu lingvuzo estas zamenhofa.) — **(fiks)ita** 1. befestigt, festgesetzt,. fixiert —. 2. überhaupt: fest, fix, d.i. unbeweglich, unverrückbar; (fiks)ita astro, Fixstern; s. akso, bloko, flango, kolumo. — **(ferm)a**. 1. schließend, Verschluß-, Schluß (z.B. -Versammlung). — [2. mm. = (ferm)ita.]

El tio ĉi ni devas konkludi ke "-ita" povas signifi „kvazaŭ -ita" ; t.e.: la *-iteco* ne estas nepre la rezulto de ago *-i*.

Nu, la lingvistiko kaj gramatiko ne apartenas al mia profesio. Mi simple apartenas al la diletantoj kaj amatoroj. Kaj kiel tia, mi opinias ke, por ke la esperantistoj povu iomete ĝuste uzi sian lingvon, tiu lingvo almenaŭ havu klare difinitajn radikojn. Tio signifas, ke, se nia Akademio foje volus fari ion utilan, ĝi forigu tiurilatajn malklaraĵojn. Al la "fundamentaj strangaĵoj" ankoraŭ apartenas, ke "flor" laŭ la Fundamento estas verba radiko, kio ankaŭ validas pri "plant". Dume nun laŭ (preskaŭ) ĉiuj vortaroj (sed ne laŭ PIV) "flor" estas substantiva radiko. Tamen *plant'* laŭ ĉiuj konsultitaj vortaroj (kun la escepto de Waringhien) estas transitiva verba radiko. Tio signifus, ke la vorto "planto" ne estus uzebla por „vegetaĵo". Iom da ordo en la ĥaoso estas dezirinda.

(Noto: "Waringhien" referencas al "Grand Dictionnaire E.-F".)

Petro Rulofido

Vosseveldlaan 16, NL-3768 GM Soest, Nederlando.

Baza vort-provizo de Esperanto cele al instruado

Josef Dörr, IPR 1994/1-2, p. 21.

Ĉiuj artikoloj pri ĉi tiu temo koncentriĝas pri baza didaktika vort-provizo (aŭ minimumo). La aŭtoro demonstris grandan varion inter lernolibraj aŭtoroj en vort-uzo. Vere, sed tio okazas, ĉar aŭtoroj foje volas uzi ne nur la bazan vorto-stokon. En fremd-lingva instruado oni nun distingas inter baza kaj kroma stoko, foje nomataj *interes-vortoj*. Vortoj en la baza stoko kutimas esti la plej ofte uzataj, plej utilaj, plej rekoneblaj vortoj; tiujn oni prezentas, kun la celo, ke la lernanto majstru kaj povu aktive uzi ilin poste en aliaj kuntekstoj. Tamen, vortoj en baza stoko tendencas fosiliiĝi el antaŭaj generacioj kaj sekvi lernolibrajn klišojn. Unuflanke, verkantoj devas aktualigi sian vorto-stokon, aliflanke oni devas agnoski la potencan avantaĝon uzi klišajn (sed prefere interesajn) situaciojn, ĉar tio ne nur donas sekurecon, sed ankaŭ permesas pli tujan rekonon kaj komprenon de novaj vortoj, pure el ilia kunteksto (foje desegna, foje aktora/gesta), evitante la emon kompreni la vortojn per tradukado el la denaska lingvo.

Interes-vortoj en tekstoj permesas prezenti pli interesajn aŭ trafajn situaciojn. Foje la interes-vortoj estos relative internaciaj kaj facile rekoneblaj. Ili estas vortoj, kiujn la studento devas kompreni en la kunteksto, sed nek nepre memori, nek povi aktive uzi — almenaŭ en tiu nivelo. Vi tamen supriziĝos, kiom da interes-vortoj la studentoj lernos kaj re-uzos, dum bazajn vortojn ili forgesos (eble ĝuste ĉar interes-vortoj *ja* estas interesaj!).

Etaj infanoj lernas potence el aŭskultado kaj reproduktado, ofte el ne-simpligitaj konversacioj. Ni subtaksas la kapablon de pli aĝaj lernantoj mem lerni el aŭskultado de riĉa lingva kunteksto. Oni ne timu foje aŭdigi la instruatan lingvon je multe pli alta nivelo ol oni atendas aktive instrui.

Same en lernolibroj oni ne riproĉu la fojan uzon de ne-bazaj vortoj. Tamen, bona lernolibro ie (eble en instruista gvidilo) indikus, kiuj el la prezentitaj vortoj estu konsideritaj bazaj kaj kiuj ne, lasante al la instruisto la finan decidon kiom postuli.

Eĉ je gramatika nivelo, oni ne timu foje uzi strukturojn, kiujn oni ne intencas ankoraŭ aktive instrui. Ekz. uzo de imperativo por doni ordonojn en Esperanto jam de la komenco de la kurso estos verŝajne komprenata jam el la kuntekso (via ordona mieno kaj voĉtono kaj gesto). Tiel leviĝas la ebleco indukte instrui tiun gramatikaĵon. **smg**

La unua leciono, IPR 95/3, p.14

Géza Kurucz sendube pravas. La unua leciono estas ege grava. Li pravas krome, ke ni ne teoriumu tro — tuj al la celata lingvo: nov-lernantoj aŭdu ĝin, elprovu ĝin. Simple, sed vere. Teorion de prononcado oni ne donu, nur bonan ekzemplon sekvatan de zorga kontrolado. Jes, provu elekti radikojn konatajn al la lernantoj (malfacile por Hungaroj, tamen ebla). Eĉ instruu eventuale 50.

Sed unu terure esenca elemento tute mankas en tiu skemo — kie la verboj!? Ili estas la motoroj de la lingvo, kaj malŝlosas la fraz-funkciigajn strukturojn. Jes, malfacilas komuniki la signifon de verboj, ekzemple per bildoj. Sed per agoj aŭ gestoj eblas, se oni elektas plej trafajn verbojn. La lernantoj tiam ligas la novan vorton rekte kun la ago aŭ gesto, kaj ĉerpos la prononcon el via ekzemplo. Prenante substantivojn skribe similan al la nacilingva ekvivalento, kaj prezentante ilin skribe, oni fortigas la ideon, ke ni komprenas Esperanton per tradukado el nacia lingvo, kaj tio fortigas la emon apliki la nacilingvan prononcon al la Esperanta vorto, ekz. *eleganta* ĉe hungaro riskas havi la fortan silabon komence, la *e* tro malferma kaj la *a* preskaŭ *o*.

Pli valore ol kvindek substantivoj, instruu en la unua leciono dek zorge elektitajn verbojn en sia plej simpla sed adekvata kunteksto, kaj vi multon pli atingos. Instruu la verbojn, kaj la substantivoj nature sekvos. Substantivojn la lernantoj mem hejme poste povas lerni el vortaro, sed la verbojn kaj sekve la frazojn ili lernu ŝofori sub zorga prezento kaj rekontrolo dum la leciono — kaj tio jam ekde la unua! **smg**

Recenzoj

Tradukarto kunlaboriga

Al la plej noblaj trajtoj de la esperantista personeco apartenas la emo peri per la Lingvo Internacia la valorajojn de la diversaj kulturoj. Tial aperis kaj aperadas tradukajoj en Esperanton, precipe el la literaturoj proza kaj poema. Ja ne estas facile traduki poemojn en alian lingvon, kaj la ŝatanto de poezio ĉiam denove ĝojas pri sukcesa traduko. Plej interese estas, se oni komprenas ankaŭ la fontolingvon kaj kapablas kompari kiel la recenzanto la novan kajeron **"Germanaj poemoj en dulingva (germana-esperanta) eldono (tr. d-ro Miklós Fehér)".** La broŝuro estas maldika, sed entenas la plej famajn poemojn de la plej renomaj Germanaj poetoj klasikaj/romantikaj.

Devas esti kuraĝa homo, kiu aliras la korifeojn *Goethe, Schiller, Heine, Uhland, Lenau, Rückert, Eichendorff.* Kaj mirigite oni malfermas la kajeron post la ekscio, ke eĉ ne Germano, sed la Hungaro Miklós Fehér verkis la tradukajojn. Ĉu tia entrepreno povas sukcesi?

La legado, la penetrado en la tekstojn forprenas eblajn dubojn: Jen majstro kapabla traduki, kapti la sencon, la senton de tute alia lingvosistemo. Aparte impresas, ke li fidele sekvis la originajn ritmojn, evitante la ofte sperteblajn pekojn kontraŭ la Esperanta prosodio. Rilate la rimojn — ĝenerale ja puraj kaj lerte elpensitaj — oni rimarkas kelkaloke elturniĝojn per la konataj licencoj de la Budapeŝta Skolo (mar' / val' ; pan' / jam), kiaj svarmas ankaŭ en la originala Hungara poezio. Kompare kun la devena lingvo ŝajnas esti iom problema la uzado de la artikolo, kiel ofte en Esperantaj tekstoj.

La tradukinto ja estas konscia pri ebla polurado, pri ŝanĝado de nuancoj. Pro tio li invitas en postparolo al detala kritikado kaj kunlaboro pliboniga. Eble tiel, kunagante , tradukajoj ĝenerale povas atingi proksimiĝon al la plej adekvata rezulto. Estus dezirinde, ke ne-Germanligvanoj per tiu ĉi kajero ek- aŭ rekontaktu la perlojn de la Germana poezio, kaj ke multaj Germanoj ĝuu la dulingvan eldonon. Kunlaboremuloj direktu sin al la tradukinto. [*Adreso: vidu paĝon 15*]. Kaj estus same dezirinde ke, post la polura fazo, la nun iom provizora maŝintajpita broŝuro povu nete aperi en nobla vesto, kiun ĝi meritas.

***Franz-Georg RÖSSLER**, gimnazia instruisto (Germanio)*

Kunvojaĝu

(Paul Gubbins, eld. Edistudio kaj ILEI — *detalaj indikoj: IPR 4/94 p. 16.***)**

"Se lernonto ne simpatias stud-materialon, tuj kreiĝas neforigebla baro inter studento kaj studotajo... kaj la Esperanto prezentita inter la kovriloj de multaj lernolibroj, kiom ajn valoraj kaj altkvalitaj, ofte ne instigas al praktika, plenkreskula lingvo-uzado." Jen tre saĝaj vortoj de Paul Gubbins en la antaŭparolo al Kunvojaĝu, pri kiu li aldonas: *"Ĝi ne estas lernolibro por aŭtodidaktoj, ĉar grava — eble la plej grava — parto de ĉiu ĉapitro konsistigas rol-ludadon, kiu siavice implicas kuneston de almenaŭ unu kroma persono, ĉu instruisto, ĉu alia lernanto. Tiel, duope, triope, estiĝas konversacioj, sin-esprimado, memfido je praktika uzado de Esperanto. "*

Oni do ne miru, ke temas pri internacia, pri sennacia lernolibro, sen klarigoj en ajna nacia lingvo. Evidente, kiel pri ĉiaj metodoj, plej gravas gvidado fare de bona instruisto (kiom da samideanoj lernis la lingvon malgraŭ la bonvolo de fuŝa instruemulo!), sed tre helpas bona instruilo, ĉefe en la komenco. Miaopinie Gubbins trafis la celon, kiun li starigis al si. Ne hazarde tio okazas en Britujo, kie dum la lastaj jaroj tre aktivas grupo da interesaj homoj kiel i.a. Tim Carr, Krys Ungar, Edmund Grimley-Evans kaj Paul Gubbins mem, profesia lingvo-instruisto, konata kiel ĵurnalisto al la legantoj de MONATO, kaj al tiuj de LBE kaj FONTO kiel barlastonisma teatremulo.

Rilate la libron, unue menciindas la tre klara kaj alloga grafika aspekto. Due, la amaso da tre utilaj ekzercoj, same skribaj kiel paroligaj, por plena aktivigo de la lernita materialo (estus des pli bone, se oni povus trovi la solvojn librofine). Trie, fortan aplaŭdon meritas la t.n. legajoj, kiel *El la agendo de s-ro Braŭn*, diversaj leteroj, veterprognozo, vivresumo (ne biografieto sed ja *curriculum vitae*; kiu proponas pli precizan terminon?), mendilo, aliĝilo, recenzo pri kasedo de la rokgrupo *Persone*, kuirrecepto, turismaj informoj pri Antverpeno aŭ informa teksto pri *Amnestio Internacia*. Temas pri materialo reala, ne inventita, sed adaptita al la bezonoj de la kurso.

Komencas ĉiun ĉapitron dialogo aŭ konversacio, kie jam prezentiĝas la traktota temo. Ofte aperas aktualaj problemoj, ekologiaj, sociaj aŭ politikaj (kiel la ekzerco B sur p. I37). Sekve aktualas ankaŭ multaj vortoj, kiel

tekstredaktilo (p. 9), *acida pluvo* (p. 197), *forcejo-efiko* (p.168), *fridujo* (p.175) aŭ *perestrojko* (p. 1 84). La kvin lastaj ĉapitroj ne plu enkondukas gramatikerojn, sed invitas al pli profunda esplorado de la lingvo. Tial, troveblas en ili tekstoj sufiĉe komplikaj, sed fakte tute normalaj, kiel tiu sur p. 158: *"Ĝuste. Do jen, en skizita formo, via letero: formulu ĝin laŭplaĉe kaj enpoŝtigu ĝin antaŭ la kvina... Mi supozas, ke mi estus povinta telefoni al s-ro Soŝimoto, ĉar tiel li estus ricevinta la inviton pli frue... sed letero pli konvenas por invito, ĉu ne?"* Parenteze, ŝajnas al mi, ke Gubbins tre lerte interplektis la etosojn kaj mediojn esperantan kaj britan.

Mi apenaŭ trovis dubajn punktojn. Mi dubas pri la uzado en lernolibro de la vorto **komputoro** (anst. **komputilo**, pli simpla kaj facila, kaj pli uzata!) aŭ de **alies** sen ajna klarigo. Temas ne pri beletro, sed pri lernilo, kaj jen tial mi aplaŭdas la uzadon de la fundamenta **-ujo** por landnomoj (anti-ujistoj ne grumblu: **-io** debutas sur p.181). Igas min dubeti la senco de **dum** sur p.164, kaj al la klarigo pri **-et-** kaj **-eg-** (p. 219) mi aldonus verban ekzemplon (ekzemple per pluvi aŭ ridi). Vere ĝenis min nur la manko (sentebla speciale en la 18-a ĉapitro) de la oftega verbo **farti**, cenzurita probable tial, ke al anglaj oreloj ĝi pensigas pri furzado. Temas ĉiel ajn pri neglekteblaj detaloj, kiuj neniom deprenas de la granda valoro de ĉi lernolibro.

Finas la libron du interesaj aldonoj: *Gramatiko — superrigardo* (reference al la apartaj ĉapitroj) kaj *Enkonduko de novaj eroj per Esperanto*. Nu, kvankam mi ne provis uzi ĝin en kurso, mi certas, ke persono atinginta la finon de *Kunvojaĝu* nepre havos bonegan bazon por plena enlingviĝo.

Georgo Kamaĉo

Forumo

Ankoraŭ pli la centjariĝo de Andreo Cseh

Estas mirige kiel Andreo Ĉe genie planis sian metodon, kaj kiel kelkaj helpantoj tuj kaptis la spiriton de la avangarda instruado farante gravajn kontribuojn. Mi aludas al la akompana *Konversacia Literaturo* (kiun faris la gelernantoj mem). Lastatempe, oni multe okupiĝas en Esperantio pri listoj de la plej oftaj vortoj, de la bazaj vortoj, k.t.p. Oni multe miris kiam Piron lanĉis la brilan libron *Gerda Malaperis* kun paralelaj tekstoj en *Lasu Min Paroli Plu*.

Tamen, sen emo malpliigi la valoron de la Piron-a verko, antaŭ 60 jaroj, oni povus tion trovi en la Konversacia Literaturo de la Baza Ĉe-Kurso. Ĝin konsistigas ok tre maldikaj diverskoloraj libretoj. Paŝon post paŝo, la instruistoj disdonas la libretojn al siaj gelernantoj. En ĉiu libreto troviĝas nur la vortoj kiujn la gelernantoj jam antaŭe lernis. En ĉiu volumo oni legas, krom rakontetojn fare de la gelernatoj, rakontojn far fraŭlino E.P., s-ro G.O., s-ro G.A., s-ro A.O., s-ro K.P., f-ino E.F., kaj Karl Löfgren. Alia hungaro, Julio Baghy, spektis la kurson, notis la vortojn, kaj produktis tre interesan amromanon, kiu ĉapitron post ĉapitro uzas nur la vortojn jam lernitajn.

Nuntempe, la moderna pedagogio alvenas al la konkludo ke estus preferinde ne paroli en la nacia lingvo, kaj eĉ ne havi lernolibron por la lingvolernado. Laŭŝajne, nia centjariĝanta Andreas Cseh konis ĉiujn avangardajn instrurimedojn (por nia tempo)...

Roberto Resende
diplomita Cseh-metoda Instruisto

NdlR — en la 3/95-a numero (p.33.) ni anoncis, ke baldaŭ aperos la ***Cseh-memorlibro****. La libro estas preta. Ĝi aĉeteblas ĉe IEI en Hago kaj ĉe UEA-libroservo en Rotterdam.*
Ĝi mendeblas ankaŭ ĉe ***Katalin Smidéliusz****, redaktinto de la libro: la prezo estas 22 NLG, inkluzive la sendokostojn. Post 10 ekzempleroj unu libro kostas 15 NLG kaj aldoniĝas la sendokostoj. La mendojn ŝi petas sendi al ŝia nova loĝadreso: Katalin Smidéliusz, Kós Károly u. 29. H-9700 Szombathely, Hungario. Hejma telefono: +36-94-320-313. Fakso: +36 94-312-248, E-poŝto: smidik@fs2.bdtf.hu..*

Géza Kurucz

Pri la uzo de substantivaj participoj

Niaj gramatikoj vaste traktas kaj riĉe ilustras la uzadon de adjektivaj kaj adverbaj participoj, temas ja pri tre delikata gramatika sistemo. En etnolingvoj la participa sistemo estas mankohava, necesas do klare prezenti la specifan trajton de nia lingvo. Tamen oni ofte forgesas pri la participoj kun *o-finaĵo* opiniante sufiĉa la mencion, ke ili preskaŭ senescepte indikas personon, t.e. ili latente enhavas la sufiksoidon: *-ul* (-antulo, atulo ktp., vd. ekz-e la neforigeblan pleonasmon: *konatulo*).

Longe mi ne havis problemojn. Ĉio ŝajnis klara ĝis antaŭ kelka tempo, kiam mi ekhezitis aŭdante la sekvan frazon: *"Kvin jarojn post la abiturientaj ekzamenoj kolektiĝis ekslernantoj de la klaso ĉe blanka tablo en restoracio."*

Miaopinie *ekslernantoj* estas barbarismo, ĉar *lernintoj* evidente elvokas la celatan nocion. De kie venas do "ekslernanto"? Ĝi sendube ekestis laŭ analogio de *eksreĝo, eksinstruisto, eksprezidento, eksministro, eksdirektoro* k.a., ĉe kiuj la radiko indikas nenian tempan rilaton. Male "lernanto" aludas personon, kiu nun lernas aŭ okupas sin pri lernado, t.e. en la tempo de la parolo li frekventas lernejon. La preciza pritempa difino, pro manko de ĉiuj ses formoj de participoj, en multaj etnolingvoj ne ekzistas. La lingvosento de hungaro, ekz-e, ne facile povas distingi inter partoprenanto kaj partopreninto, la diferenco por li estas harfende subtila.

Bonvolu atenti pri la frazoj: *La partoprenantoj prisdikutis la aferon*. Tio signifas, ke ili pridiskutis la aferon, kiam ili partoprenis en io. Sed: *La*

partoprenintoj estis premiitaj signifas, ke la konkurso, ekz-e, jam finiĝis, ili ne plu konkursas, kiam ili ricevis premion, ĉar se anstataŭ partoprenintoj oni dirus partoprenantoj, la frazo indikus, ke ili ankoraŭ partoprenis, estis partoprenantaj en io, kaj verŝajne pro la partopreno mem ili estis premiitaj.

Kaj nun bonvolu kompari la sekvan frazoparon: *La partoprenantoj /partoprenintoj raportis pri la vivo de siaj kluboj*. En la unua okazo iuj kiuj partoprenis ekzemple kongreson, dum la kongreso faris raporton pri siaj kluboj; dum ĉe la dua frazo: iuj kiuj *antaŭe* partoprenis kongreson, faris *poste* raporton pri siaj kluboj, sed tutcerte ne al la kongresanoj, povas esti, ke en iu klubo post la kongreso. En la dua ekzemplo oni nepre devas konsideri la antaŭtempecon de *-intoj* al la predikata verbo: raport*is*, dum en la unua, *-antoj* montras samtempecon kun la predikato: en tiu sama tempo, kiam ili partoprenis.

Nun komparu la frazon: *La prezidanto salutis la alvenantojn* kun la simila: *La prezidanto salutis la alvenintojn*. Estas klare, ke en la unua okazo la prezidanto salutis tiujn kiuj ĝuste tiam alvenis, do ili ankoraŭ ne sidis, sed ĝuste tiam envenis la salonon, dum en la dua: ili jam alvenis pli frue, ili probable sidis kaj aŭskultis la prezidanton. La diferenco estas grava, ili estigas ja malsamajn bildojn en la menso.

Kion diri pri la frazoj: *La Savonto venos./ La Savinto venos./ La Savanto venos*. La unua signifas: venos tiu kiu iam *poste* savos nin, aŭ: venos tiu kiu estos nin savonta. Kiam la verbo staras je prezenco aŭ preterito la *Savonto* indikas futuron al la nuno, respektive al iu pasinta tempopunkto kaj la savo en ĉi-lasta okazo en la momento de la parolo jam povis delonge okazi.

La dua frazo aludas pri tiu, kiu venos, sed *antaŭ* sia alveno li jam savis/-os nin. Kiel en la ofte uzata esprimo: *murdinto reiras (kutime) al la okazejo de la murdo*. Tiu ĉi ekzemplo tre reliefe ilustras antaŭtempecon, kaj probable neniu dirus en Esperanto: *murdanto,* malgraŭ ke temas ne pri certa persono, kiu ĵus murdis, sed pri ĝenerale valida konstato, kiam en Esperanto oni preferas uzi prezencon (vd. *Evitu ŝtelantojn! Demandanto ne vojeraras. Rajdanto ne komprenas piediranton* ktp.) Estas konstateble, ke *-anto/ -into/ -onto* (tiel same: *-ato, -ito, -oto*) esprimas klaran tempan rilaton ne al la aktuala tempo de la parolo, sed al tiu de la predikato. Alivorte ili ne estas uzataj en absoluta formo. Misformoj venas el tri fontoj.


La unua: participo prezenca kun *o*-finaĵo prezentas ne nur personon, kiu agas en la momento de la parolo, aŭ ĝenerale validan konstaton, sed ankaŭ personon, kies ago koincidas kun la tempo de la predikato: *La vizitantoj tagmanĝis en la apuda restoracio*. Kaj oni ne povas, sen ŝanĝi la sencon, diri: *La vizitintoj...*, ĉar tiuokaze, kiel mi prezentis supre, la vizito de iu loko jam okazis pli frue, ĝi ne plu daŭras. La parolanton psike misgvidas, ke rilate al la nuno, t.e. momento de la parolo, la vizito efektive okazis en la pasinteco, sekve oni emas uzi la formon preteritan. Sed ne forgesu, ke participoj, inkluzive la

substantivan formon, montras *sam-, antaŭ-, aŭ posttempecon* rilate al la tempo *predikata*.

La dua: en etnolingvoj ne ekzistas tiom da participaj formoj. Kelkaj el ili havas nur du aŭ tri formojn, sekve sub influo de la gepatra etnolingvo oni preferas (precipe en la unua etapo de la studado) la ekzistantajn formojn, prezencon anstataŭ futuro, se tie mankas la formo de futuro.

La tria: misaĵoj povas deveni de sinonimaj paroj: *instruisto - instruanto; naĝisto - naĝanto; kuiristo - kuiranto...*, kie la unuaj formoj indikas profesiulon, konstantan okupon, dum la duaj — provizoran, portempan okupon. Kiam oni hezitas do uzi la sufikson *-isto*, oni prenas la formon *-anto*, opiniante ke okazos nenia miskompreno. Sed ne forgesu: transirante de *-isto* al formo participa oni devas elekti inter tri eblaj sinonimoj. La decido ne estas malfacila, ĉar preskaŭ ĉiam *-anto* estas bezonata, tamen ĉe *eks...isto* tutcerte ne, tiam evidente necesas la formo: *-into*. Aŭ kiam temas pri posttempeco, kiel en la frazo: *Ĉio ĉi okazis en la jaro 1422, kiam la malkovronto de Ameriko ankoraŭ ne naskiĝis*.

Fine mi deziras turni la atenton al kuraĝa uzado de participoj substantivaj. Mi estas konvinkita, ke ni ankoraŭ ne ekspluatis ĉiujn eblojn. Precipe la futuraj formoj, kiuj ofte mankas en etnolingvoj, havas frapajn koncizajn esprimojn. Ekz-e: *Ekzamenoto timas, ekzamenito fanfaronas*. Ne multaj lingvoj povas la frazon esprimi tiel koncize. Konsideru aliajn ekzemplojn: *Ne ĉiu savonto fariĝas savinto. La polico kaptis la murdonton. La murdoto estis savita. Tio estis la lasta deziro de la ekzekutoto*. Estus por mi plezuro, se kelkaj malkovrus antaŭ mi sian opinion.



János Petik

Serve de altaj pretendoj

Nia movada agado daŭras stagnadi, eĉ, refali: ekz. en Hungario la kvantaj indicoj de la E-instruo refalis je sia ono. Tio ĉi eble klarigeblas per la malfavoraj socipolitikaj ŝanĝoj, okazintaj en tiuj Eŭropaj landoj, kiuj esence formis la bazon de nia movado.

Tiu ĉi fenomeno meritus apartan esploron, okupi min pri ĝi mi nun ne volas. La bazon de tiu ĉi eseo formas do ne tiu ĉi objektiva cirkonstanco, sed la konjektaĵo, ke la forlason de nia afero (ne nur nun) eble kaŭzas la malfavora rilatiĝo de niaj s-anoj al la lingvo mem. Ke ĉi tiaj konjektoj sonoras ĝenerale malplaĉe, mi konscias, precipe konsidere la multajn deklarojn pri la taŭgeco de nia lingvo. Sed mi volas ne kontesti tiujn ĉi deklaraĵojn, ĉar por la taŭgeco pledas ja fakto ne malpli granda, ol la pli ol 100-jara ekzisto mem de E.

Kaj tamen: ĉu esti trankvilaj, kontentaj sub la ŝildo de ĉi tiuj gardaj deklaraĵoj ni povas? La foje-foje aperantaj rimarkoj pri la lingvo pruvas, ke tiuj

pledaj deklaroj baziĝas sur pretendoj pri lingvo de averaĝa nivelo, kaj ankaŭ, ke la pretendojn de ĉiuj la nuna lingvo ne plenumas. Ekz. mi mem devas konfesi, ke E-o, kiel tutaĵo min tute ne kontentigas: tiu ĉi tutaĵo estas ja tro monoliteca kaj tiu ĉi „monolito" estas tro vulgara por atingi la nivelon de literatura lingvo. La primara kriterio kontraŭ ĉiu beletraĵo en iu ajn lingvo estas ĝia lingva evoluinteco, ebla perfekteco, kaj tiun ĉi kriterion E-o, laŭ mia opinio, ne adekvatas. Mi rapidas tuj almeti, ke tiu ĉi supozeble konsterniga kaj ŝajne aŭdaca konstataĵo koncernas — ne ĝian leksikon, sed ĝiajn aspektojn vortordan kaj sinetian.

En la subaj mi provos koncize skizi mian ĉi-rilatan direndaĵon. La fina celo de mia klopodo estas regajni E-on, ĉar antaŭ ĉ. 5 jaroj el la estimo far mi ĝi ete elfalis. Mi konjektas, ke ĉi tian krizan staton travivis ankaŭ ceteraj ges-anoj, sekve, se fine E-on mi regajnos por mi, mi ĝin regajnos ankaŭ por ĉi tiuj enkrizaj ges-anoj. Mi volas ne reformi la lingvon, sed kompletigi ĝin per tio, kio el ĝi ĝis nun mankis (-as). Mi antaŭmencias, ke krom 1-2 gramatikaĵoj en la subaj de mi originas nenio. Mi certigas ankaŭ, ke miaj frazstrukturoj estas ne sole ne-kontraŭ-fundamentaj, sed ili rekte devenas de tie. Se tamen, kiel ekz. kaze de la nedifina artikolo mi trudiĝos ĝin malobservi, tio okazas nur por solvi ion ankaŭ tie kontraŭdiran.

Trudiĝas ĉi tien ankoraŭ la sincera konfeso, ke mia klopodo estas ete ambicia: mi deziras ne malpli, ol proksimi la supremenciitan, eblan perfektecon de la lingvo. Ĉar tio ĉi kondiĉas nian kunpenson, kunlaboron kaj ĉar la tasko estas tre malfacila, en la subaj vi legos nur pri proponaĵoj kaj ne pri pretaj, kompletaj konceptoj.

La afero de la nedifina artikolo

Kvankam da similaj problemoj kelkaj pluaj ankoraŭ ekzistas, pro ĝia graveco mi traktas sole ĉi tiun. Kiel tio estas konate, „malpermesante" ĝian ekziston, pri tiu ĉi afero dispozicias la 1-a regulo de la Z-a gramatiko. La afero kontraŭdira estas pro tio, ĉar refutante ĝian ekzistorajton, surogaton de la nedifina artikolo eble plej ofte kaj eĉ en la Fundamento mem, uzis Z mem.

Post la malapero (ne definitiva) de „unu", surogate nun pleje rolas „iu". Problemon tiu ĉi kaŭzas pro du kialoj: 1. ĝia konsekvenca uzo pruvas la ekzistorajton de la nedifina artikolo, „ekzili" ĝin Z provis do vane, 2. en tiu ĉi rolo „iu" ne taŭgas.

Kvankam apartan, propran formon ricevinta sole en la angla (el inter la plej laŭmodaj), ĝi krom la slavaj lingvoj eble troveblas en la tuta Eŭropo. Ĝia uzo ebligas la esprimon de nuancoj de homa spirito, kiujn esprimi en la nuna E estas neeble aŭ malfacile. Jen la nuancoj esprimeblaj per uzo aŭ manko de artikoloj.

1.1. *Mi iris en kinejon* (por spekti filmon kaj ne por labori).
1.2. *Mi iris en la kinejon* (da ili tie troveblas nur unu).

1.3. *Mi iris en **un** kinejon* (ekz. fuĝante de antaŭ subita pluvego).

La „un" en tiu ĉi frazo, kvankam responda al la itala-franca ekvivalento, estas mia „arbitraĵo".

Simile: 2.1. *Mi aĉetis hundon* (por gardi la hejmon).
2.2. *Mi aĉetis la hundon* (pli frue priparolitan).
2.3. *Mi aĉetis **un** hundon* (eble ĉar mi ilin ŝatas).

En tiu ĉi funkcio „iu" ne taŭgas, ĉar: 1. ĝi sugestas aron de aĵoj pli malvastan ol kiom sugestas „un", kiu fakte implicas aron absolute nelimigitan. Kaj ne, ĉar: 2. ĝia senco estas neunusenca. Jen un ekzemplo. En sia tradukaĵo de la Madách-a ĉefverko, la historiulojn Brutus kaj Catilina, Kalocsay metafore uzis ĉi tiel: *„Kiu vidus la / fadenojn, kiuj sur ties scenejo / movadas iun Brutus, Catilina?"* Je la unua lego, oni sentas, kvazaŭ da Brutus-oj kaj Catilina-j ekzistus ankaŭ pli ol unu. Cetere en tiu ĉi sistemo lokon havas ankaŭ „iu":

1.4. *Mi iris en iun kinejon* (el inter la ceteraj).
2.4. *Mi aĉetis iun hundon* (el la tiea sortimento).

Ĉi-kaze unuavice temas ne pri tio, ke oficialigita estu mia „un", sed ke ia aparta, propra, ĉi-cela gramatikaĵo absolute ekzistu.

Pri la E-a vortordo

Dum kaze de la nedifina artikolo temas pri enkonduko de un gramatikaĵo „kunkorpa", ĉi-kaze temas pri akcepto de ĝenerala regulo, do de gramatikaĵo „senkorpa". Se la antaŭa gramatikaĵo takseblas ne tre grava (ŝajne, ĝin ankaŭ Z taksis ĉi tia), tiu de la vortordo estas jam multe pli grava. La kerno de la problemo skizeblas ĉi tiel. Bona takseblas unuavice tiu lingvo, kiu la nuancojn de la homa spirito spegulas fidele kaj unusence. Ĝis nun la atento de la E-lingvistoj ampleksis unuavice la semantikon de vortoj, morfemoj, al la esploro de la eroj de la komunika procezo (de la frazo) ni relative dediĉis malmulte da atento. Sekve, ĉi-kampe en E-o regas ete da anarĥio.

El vidpunkto de reliefigo de frazelementoj la frazoj arigeblas en 2 grupojn: la unua nomiĝas frazoj neŭtralaj, la dua tiuj kun fokusa frazelemento. En la unua fraztipo ĉiu frazelemento (subjekto, predikato, ktp.) pli-malpli gravas samgrade. Ekz.: „Hieraŭ venis al ni du viroj." En la dua, el inter la enfrazaj elementoj gravas nur unu, nome tiu, kiu reprezentas la sekvan informaĵon en la komunika procezo. Tiun ĉi elementon oni nomas fokusa frazelemento, aŭ frazkomento. La ceteraj elementoj servas por ligi la koncernan frazon al tiu antaŭa, ilia nomo estas fraztopiko. Jen un frazo kun fokusa frazelemento: Hieraŭ mi legis un interesan libron. La demando estas, ke la frazkomento estas kiu frazelemento: ĉu la adjekto (hieraŭ), la subjekto (mi), la predikato (legis), eventuale la objekto (interesan libron)? Per tiu ĉi demando ni atingis la esencon de mia direndaĵo: la reliefigo de la frazkomento bezonas unuecan sistemon, ĉar en E-o ĝi nun ne ekzistas.

Verdire, mia leganto nun estas en situacio relative favora, facila, ĉar en mia ĝisnuna teksto (kiun mi destinis esti modela), mi klopodis konsekvence apliki

un sistemon, kiu konsistas en meto de la frazkomento finen de la frazo. Se mian tekston vi legis eĉ ete lingvistike konscie, pri tio ĉi via cerbo probable konsciiĝis ankaŭ sen fortostreĉo. Kun pli da atento, rimarki vi povos ankaŭ, ke senpere antaŭ tiu ĉi frazfina, emfazita elemento staras ia verba predikato (ev. kopulo), aŭ, se la komento estas la predikato mem, tie staras la subjekto. En ĉio ĉi apriora, arbitra estas nenio. La sistemon mi ellaboris surbaze de rezultoj de analizo unuparte en E-o, aliparte en „grandaj" naciaj lingvoj (kaj ankaŭ en la hungara). Anstataŭ detala ekspliko de la sistemo jen kelkaj ilustraj frazoj.

Emfazita estas:
subjekto: *Hieraŭ libron legis mi* (kaj ne vi).
predikato: *Hieraŭ la libron mi legis* (kaj ne nur ŝajnigis tion).
objekto: *Hieraŭ mi legis libron* (kaj ne ekz. gazeton).
adjekto: *Libron mi legis hieraŭ* (kaj ne hodiaŭ).

Per la apliko de la sistemo en la predikativa strukturo malfermiĝas nova eblaĵo por plivastigi la kampon de la scipovo de E-o. Jen eblaĵoj. Emfazita estas:

1. predikativo: *La floro estas bela* (kaj ne malbela).
2. subjekto: *Bela estas la floro* (kaj ne io alia).
3. kopulo: *La floro bela estas* (eĉ se pri tio vi dubas).

Ankaŭ la strukturo helpverbo-ĉefverbo-komplemento reprezentas kampon por plua evoluigo. Jen eblaĵoj. Emfazita estas:

1. ĉefverbo kaj kompl.: *Mi deziras legi libron* (kaj ne spekti filmon).
2. ĉefverbo: *La libron mi volas legi* (kaj ne vendi).
3. komplemento: *Legi mi volas la libron* (kaj ne gazeton).
4. helpverbo: *Legi la libron mi deziras* (eĉ se pri tio vi dubas).

Tiuj ĉi eblaĵoj rigardeblas de graveco primara. Ekzistas ankaŭ tiuj sekundaraj, ili ampleksas la kampon de la epiteta sintagmo. Disvolvi ilin ankaŭ en E ni scipovus, sed ĝia vivmedio supozeble estas jam la beletristiko.

Leviĝas la demando, ĉu ekstremaĵojn tiu ĉi sistemo havas. Jes, ĝi havas. La unua rilatas la demandan frazon — pli precize, tiun kun demanda pronomo. Koncize temas pri tio, ke ĉar tiuj ĉi gramatikaĵoj (kiel ĉi tiaj) ĉiam rolas frazkomence, ilia loko estus ĉiam la fino de la frazo, kio siavice kontraŭas niajn ĝisnunajn kutimojn. Demandi ni devus do ĉi tiel: Vi iras kien? — Mi iras en la vendejon. Ke ĉio ĉi grave estas pro kio? Simple: pro la manko de ordo ĉi-terene. Manke de unueca sistemo por reliefigi la frazkomenton, kaj uzante siajn proprajn nacilingvajn kutimojn ĉiu objektive instalas novajn vortordojn, kiuj estas ne E-aj, sed jen hungaraj, jen anglaj, ktp. Do ĉiaj, sed ne aŭtentike E-aj, ĉar ĉi tia vortordo ankaŭ ne ekzistas. Jen kelkaj pruvoj. La subaj frazoj originas el un beletraĵo de un hungaro kaj reprezentas la hungaran sistemon de reliefigo de frazelementoj. *„La sinjoro profesoro estas ĉi tie."* (Diris iu, anoncante la alveninton.) *„La Morto kun ekbrila espero rigardis la profesoron."* (Esti la substrekita strukturo povas ankaŭ suplemento al „la Morto", kvankam ĝi efektive rolas ne ĉi tiel.)

La subaj 2 frazoj originas el un romaneto de B. Golden „Infero Aŭtuna". 1. „Ne, mi ne bezonas *ŝin*. Kion mi bezonas estas *ŝia familio*." El la konteksto evidentiĝas, ke la kursivigon klarigas la malbona situigo de „ne", ĝi koncernas ja ne „bezonas", sekve stari ĝi devus antaŭ „ŝin", sed ĉi tia situigo de „ne" (=not) en la angla estas neebla kaj ankaŭ en E ĝi estas ne tre kutima. Similajn zorgojn vekas ankaŭ la dua frazekzemplo: „Ne, mi nur deziras, ke vi foriru malproksimen..." Ĉi-kaze temas pri la malbona situigo de „nur", stari ĝi devus ja ne antaŭ sed post „deziras", ĉar ĝi koncernas la propozocion post „deziras". La fenomeno refoje klarigeblas per la rigideco de la angla vortordo, pro kiu esti la loko de la ekvivalento de „nur" povas ne ie ajn.

La plej grava fonto de la vortorda anarĥio verŝajne estas nia Plena Analiza Gramatiko, kiu pri la E-a vortordo konstatas regulojn nerealajn. Ĝi nome konstatas, ke la reliefigo de un frazlemento okazas per la meto de la koncerna elemento fronten de la frazo. Tiun ĉi „regulon" nereala mi nomas pro tio, ĉar al ĝi miaj spertaĵoj kontraŭas. Mi trastudis plurajn tekstojn por difini la regulon, kaj trovis, ke en 60-80 %-oj de la frazoj la frazkomento staras ie fine. Sian regulon refutas la aŭtoroj mem de tiu ĉi fama verkaĵo metante la komenton plie finen en la frazoj en siaj verkaĵoj.

Anstataŭ propra vortordo E-on nun karakterizas la superrego de ĥindoeŭropaj kutimoj, kliŝaĵoj. Tion ĉi plej okulfrape pruvas la panelo „ne plu" en ekz.: „Mi ne plu volas manĝi." Diri la parolinto efektive volis tion, ke „Manĝi plu mi ne volas", la zorgon kaŭzas tio, ke li/ŝi neis ne „volis" al kiu ĝi efektive rilatas, sed „plu". Kvankam la rezultato estas tiu sama, la celon li/ŝi atingis per „ĉirkaŭvojo". Esplorante la lingvo-mediajn fonojn ni trovos, ke „ne plu" efektive estas la ekvivalento de la angla „no longer", la germana „kein mehr", aŭ de la franca „non... plus".

La adopton de tiu ĉi sistemo sendube malhelpas la cirkonstanco, ke niaj lernolibroj, gramatikoj la sintakson traktas tre supraĵe, kion pruvas la ĝisnuna manko de la fakterminoj ĉi-rilataj en niaj gramatikoj. Progreso konstateblos nur, se estiĝos ankaŭ pretendo je ĝi. (La situacio nun aspektas tiel, ke ĉiu s-ano provanta atingi iom da progreso ĉi-kampe, ricevas ne apogon, sed la brulstampon de herezoj provantaj „detrui" la konstruaĵon de E.)

Esti E povus la plej perfekta lingvo de la mondo. Tiu ĉi sistemo de reliefigo de frazkomento nun parte prezentita E-on igas ete malpli facila. Ĉu por la lingvo tio ĉi utilos aŭ malutilos? Ni deziras, ke nia lingvo taŭgu kaj kiel lingvo por beletristiko kaj kiel ĉiutaga komunikilo ekz. en la unuiĝonta Eŭropo. Ambaŭ ambicioj necesigas ankaŭ ĉi-tian perfektigon, pluevoluigon. Beletristiko necesigas ja kapablon esprimi la plej delikatajn nuancojn de la homa animo, ĉar la homaro enhavas ankaŭ naciojn kun lingvo kapabla plenumi ĉi tiun pretendon (kiel ekz. la hungara). La anoj de ĉi tiuj nacioj pretendas, ke la internacia lingvo estu almenaŭ tiom evoluinta — el ĉiu vidpunkto, do ankaŭ

el tiu de la vortordo — kiom estas la sia, kaj la nuna E tiujn ĉi pretendaĵojn plenumas ne por ĉiu s-ano.

Reliefigi la frazkomenton oni povas ankaŭ per „korpohavaj" rimedoj (ekz. per partikuloj), sed en E radikojn kreskigas la rimedo „senkorpa" — do la vortordo. Nian lingvon ni nomas tiu kun libera vortordo, sed — kial tion sentigis ankaŭ tiu ĉi eseo — tiu ĉi libereco estas ankoraŭ ne totala. Inspiri la nocio de libereco de vortordo povas konceptojn diversajn (Kalocsay ekz. ŝajne preferis la aspektojn estetikajn), al ni la plej bonan solvon supozeble portos tiu sistemo, kiu plej grava igas la relifeigon de la frazkomento. La libereco de vortordo signifas liberecon ne absolutan, sed liberan elekton de la aktuale necesa „senlibereco" deviga.


Kaj fine: ke ĉi tiel E iĝos malpli facila ol ĝi estis ĝis nun? Sed paroli (=paroli ĝuste) ĉiam estas malfacile. La esprimo de subtilaj ideo-diferencoj bezonas lingvon subtilan. Tio ĉi necesigas, ke la lingvajn rimedojn necesajn por igi la skriban lingvaĵon samvalora kiel tiu buŝa, la bona lingvo posedu. (En skribo halti, prononci kun granda forto por signi la fokusan frazparton estas neeble — la vortordo grava estas ĝuste pro ĉi tio.)

Ĉio ĉi signifas oferon — sed tian, kian fari valoras.

NdlR — Respektante tion, ke la aŭtoro volas influi la normo-evoluon de nia lingvo, ni ne ŝanĝis la lingvaĵon de la originala artikolo. La redakcio akceptas, ke la nekutimaĵoj de la teksto estas plejparte ne hazardaj, sed laŭ la intenco de la aŭtoro.

Por via notlibro

Kristnaskaj kartoj en Esperanto



La ĉarmajn kaj originalajn kartojn produktis Erika Tóth kaj Mike Sadler. Ĉiu el la kvar tipoj *(Amiko Neĝulo, Kristnaska kolombo, Invito al Avo Frosto, Bebeto Jesuo)* havas frontpaĝe kristnaskan saluton kaj infandesegnaĵon faritan laŭ speciale verkita poemeto kiu aperas sur la lasta paĝo - la internaj paĝoj restas liberaj por via mesaĝo. Ĉiu karto kostas 1 DEM (aŭ ekvivalenton).

Aldoniĝas 2 DEM sendokostoj por kiom ajn da kartoj, ekz. sendante 10 DEM vi ricevos 8 kartojn. Por ŝpari bankokostojn aŭ sendu konverteblan monbileton en letero, aŭ pagu al la UEA konto MSAD-W kaj ili plej eble rapide ekspedos respondan nombron da kartoj.

Kiuj sendas minimume 30 DEM (B-landanoj minimume 10 DEM) ricevos 50 % pli da kartoj. Provkarton eblas ricevi sendante 2 IRK-ojn. Skribu al: *Kristnaskaj Kartoj, Esperanto Domo, pf. 87. H-1675 Budapest, Hungario*

„La aŭkcio"

En la mezaj paĝoj de nia antaŭa numero aperis nia unua taskfolio „La aŭkcio". Ni proponas, ke vi fotokopie kreu klaskompletojn. Ni tamen petis nian presejon, Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno, Belgio, krompresi la paĝojn en modesta kvanto (kaj en pli eta kvanto kun la instruista gvidilo). Instruisto (aŭ -anto) havanta konton ĉe FEL (pro „Monato" aŭ ilia libroservo, ekzemple) rajtas peti stokon de la paĝoj. ILEI donacos la paĝojn, FEL fakturos al vi nur la eksped- kaj afranko-kostojn.

La krompreso celas ĉefe instruistojn, kie mankas kaj transpageblo kaj kopiiloj. Tiuj petu stokon de la komisiito por eldonado ĉe ILEI, pf. 193., H-1368 Budapest. (La sama validas por estontaj gazet-mezaj taskofolioj.)

La tria numero de *Juna amiko* por 1995 havas temon: **instruado**. Tie ni traktas la temon ne nur teorie. La kvar mezaj paĝoj estas kolore presitaj kun bildoj de Pavel Rak. Ili prezentas verbo-centran unuan lecionon por Esperanto, kies ĉef-rolulo estas la Esperanto-spiono Nulo-Nulo-Kvin (005), lia estro Z kaj amikino Sonja. Vi povas mendi kvanton de tiuj folioj, ĉar ili estis krome presitaj. En la revuo aperas invito al la legantoj ekesti instruisto. Ili ricevis ekstran ekzempleron de la kvar paĝoj, kaj krome en la revuo trovis konsilojn, kiel prezenti kaj uzi la paĝojn. Per tio ili povas inviti siajn amikojn al senpaga leciono kaj ekesti instruistoj.

Temaro de Juna Amiko por 1996

1996/1: Energio: muskola kaj maŝina
1996/2: Koni kaj rekoni. Kiun vi konas? Famaj personoj.
1996/3: Komuniki: homoj, lingvoj, bestoj, blekoj, helpiloj...
1996/4: Vojaĝi: Kien? Kiam? Kiel? Kial?

Nova kantaro

Triopo, kiu amas ne nur Esperanton sed ankaŭ infanojn, kunlaboras por eldoni novan kantlibron por junaj infanoj. La triopon konsistigas:

* S-ino Charlotte Kohrs ("Infanoj ĉirkaŭ la Mondo", San Diego, Usono)
* S-ino Mila v.d. Horst-Kolińska ("Internacia E-Instituto", Hago, Nederlando)
* S-ro Ton Verwoerd (instruisto pri Esperanto, Heemskerk, Nederlando)

Temas pri simplaj kantoj didaktikaj, kiuj instigas infanojn konversacii, gesti, ridi, aktori ktp. Se vi disponas pri tiaj kantoj, bonvolu alsendi tekston kun muziknotoj al a subskribinto, kiu decidos pri kvalito kaj akcepto. La kantaro estas grandformata (A-4), facile manipulebla, plastigita, ilustrita, 36-paĝa kaj provizita per muziknotoj, gitarsimboloj kaj didaktikaj sugestoj.

La kantlibro nomiĝas "VIVU LA VIVO". Ĝin kompilas, kompostas kaj eldonas S-ro Bram Hijmans, profesia muzikinstruisto kaj estro de la

muzikeldonejo "Nieuwe Lente" ("Nova Printempo"). Peras kaj prirespondecas la aferon por Esperantujo S-ro Ton Verwoerd.

La eldona findato estos la 31-a de la venonta decembro. La provizora eldonkvanto estos limigita (100 ekz.). Rekomendindas antaŭmendi la kantaron ĝirante la prezon de 15 guldenoj al la UEA-konto "tonv-i" de Ton Verwoerd, Heemskerk, mencinte "por VIVU LA VIVO". En la nova jaro 1996 la prezo plialtiĝos.

Ton Verwoerd

Luxemburglaan 545, NL-1966 MJ HEEMSKERK, Nederlando

Leterkesto

„Estimata Kolego Németh, mi ĵus je la dua fojo ĝisfine legis la artikolon de B. Golden pri la transitiveco de la verboj en E-o (IPR 95/1+2). Mi devas diri, ke Golden precize trafis kaj klarigis miajn proprajn spertojn kaj miajn ĝis nun ĥaosajn pensojn kaj emociojn pri tiu temo. La argumentado tute konvinkis min, kaj la proponitaj solvoj ŝajnas ankaŭ por mi irenda vojo. Do, mi dankas B. Golden, kaj ankaŭ Vin por la publikigo de tiu ĉi artikolo.....


...Estas tre alloga por mi la rubriko „El landoj kaj sekcioj", ĝi interesas la legantojn, donas rapidan superrigardon

....Tre interesa la intervjuo kun s-ro Rössler kaj eĉ pli interesus min — laŭ mia fantazio — rubriko kun tre mallongaj, 3-4 liniaj reagoj de la legantoj."

Hans Fechler, *D-31139 Hildesheim, Alfelder Str. 9.*

La solvo de la testo: 1.D, 2.A, 3.C, 4.C, 5.C, 6.B, 7.A, 8.D, 9.D, 10.C, 11.A, 12.A, 13. B, 14.B, 15.D, 16.A, 17.B, 18.D, 19.A, 20.C

Postparolo



Per tiu ĉi numero IPR finas periodon en sia historio, ĝi alvenis al la fino de la unua kvaron-jarcento. Do, nun vi legas la simbolan centan numeron. Certe nur simbolan, ĉar estis periodoj, kiam ĝi ne aperis kvarfoje jare. Mi scias preskaŭ nenion pri la pli fruaj tempoj: bedaŭrinde mi havas kolekton nur de la jaro 1988. Ĉu estas iu inter vi, kiu povus disponigi al la redakcio la mankantajn jarkolektojn? Ĝi apartenus poste al la ĉiama redakcio.

Se tio ne eblas, ni volonte aperigus artikolon, kiu resumas la ĝisnunan historion de IPR. *Redaktofino por tiu ĉi numero: la 31-a de oktobro 1995, planita redaktofino por la numero 1/96: la 15-a de januaro 1996.*

Jozefo Németh, *redaktoro*

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana.
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez, Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, AR-5000 Córdoba, (Córdoba).
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien.
Belgio: Raymond. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo (SP).
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca.
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno.
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn.
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn.
Hispanio: vakas
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest.
Israelo: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa.
Japanio: Masumi Suzuki, Fukaya 122-10, Ayase-shi, Kanagawa-ken, 252
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59. HR-10000 Zagreb.
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Vibroa, CU-11500 C. Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard.
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw.
Portugalio: d-ro A. M. Coimbra, Rua Colonel M. Leitão 20.1 Esq. PT-1700 Lisboa.
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Ruslo: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RUS-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby.
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets.
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-B.Yao,B.P.20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Bašić (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (+32 3) 666 62 66.

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko*.

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, I-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Espereanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. *Katalin Smidéliusz*, nia vicredaktoro, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto. Ŝia adreso: smidik@fs2.bdtf.hu. En urĝaj kazoj vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. Ĝin sendu al la laborejo de la edzino de Jozefo Németh: *Némethné Varga Mária* (36-89) 324953. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.